

IE IL P O P O L A C I N I O

中國報週

7 1985





Nova Elkreskaĵo Foto de JANG DAĜOU

Enhavo

Esperanto:

Vortoj skribitaj de s-ro Hujucz	2
La pekina universala kongreso de Esperanto en perspektivo	2
Per Esperanto tra Ĉinio	8
Kunsidis "Amikoj de Esperanto"	6
Aŭgsburgo bonvenigos vin	10
Esp-novaĵoj	62
Por komencantoj: Nesatigebla lupoj	65

Politiko: Pri la Tria Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio	25
Juro: Ekonomiaj leĝoj de Ĉinio en la ekonomia struktura reformo	26
Socio: Novaj ŝanĝigoj en ĉinaj kamparaj familioj	44
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (7): Eksaristokratoj de Tibeto	51
Ekonomio: La leviĝanta terciara industrio de Ĉinio	21
Malfermitaj urboj: Nantong--nova bazo de eks portado	18
Scienco kaj tekniko: La progreso de ĉinlingva informa traktado	28
Sporto: Dek plej elstaraj sportistoj de Ĉinio	40

Arto:	
La baleto "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj"	36
Iom pri la ĉinaj papertranĉaĵoj	38
Folkloro: La elemento manka	58
Poemo: Al la kverko	47
Arkeologio: Jadaj homfiguroj en tombo de reĝa kromedzino antaŭ 3 000 jaroj	56
Enciklopedieto de Ĉinio: Pagodoj de Ĉinio	11
Vojaĝo tra Ĉinio: La antikva urbo Nankino	31
Vidindaj lokoj: Pejzaĝoj de la Tibeta Altebenaĵo	53
Kultura interŝanĝo: Bulgaraj muzikistoj en Pekino	60
Ĉinlingva kurso	67
Kurantaj aferoj	48
Inter ni:	
Kion rimarkigis niaj legantoj	30
Proponoj kaj kritikoj	66
Fotoj faritaj de E-istoj	68

SUR LA KOVRILO: Sceno el la baleto "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj"	Foto de Caj Hajfeng
INTERNE DE LA KOVRILO: Nova Elkreskaĵo	Foto de Jang Daĝoŭ
SUR LA DORSKOVRILO: La Flava Rivero en Aŭtuno (Ĉinstila pentraĵo)	Foto de Ŝje Bingji

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00	
Aŭstralio	\$A	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00	
Britio	£	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00				
		Italio	Lit	11 000.00	Portugalia	Esc.	700.00				
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:			£	2.80	US\$	4.00

VORTOJ SKRIBITAJ DE HUCZ, VICPREZIDANTO DE LA KONSTANTA KOMITATO DE LA ĈINA POPOLA KONGRESO KAJ PREZIDANTO DE LA ĈINA ESPERANTO-LIGO

La 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en 1986 en Pekino. En la nomo de la ĉinaj esperantistoj, s-ro Hucz, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso kaj prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, bonvenigas samideanojn de ĉiuj landoj al la kongreso. Jen afablaj vortoj skribitaj de li.

— La Red.

*Gesamideanoj el ĉiuj landoj!
Bonvolu veni al Pekino por seesti
la universalan kongreson. Mitutkore petas.*

*Hucz
1985. 2.*

ŜJŬE MEJŜJAN:

La pekina universala kongreso de Esperanto en perspektivo

— INTERVJUOJ AL ESTRARANOJ DE UEA

KIEL raportistino de Radio Pekino, mi partoprenis en la 69-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vankuvero de Kanado de la 21-a ĝis la 28-a de julio, pasintjare.

La belaj pejzaĝoj de la marborda urbo Vankuvero kaj la densa Esperanta etoso de la kongreso profunde impresis la kongresanojn kaj postlasis belajn rememorojn al ili. Sed plej ĝojige estis, ke la estraro de la Universala Esperanto-Asocio en la kongreso oficiale deklaris la definitivitan decidon okazigi la 71-an Universalan Kongreson en Pekino de Ĉinio en la jaro 1986.

En la lastaj du jaroj multaj en Esperantujo parolis pri eventuala Pekina Kongreso. Jen kial eksplodis tondra manklakado en la kongresejo post kiam oni deklaris la decidon. La reago estis sprona. Pli ol 50 samideanoj tuj pagis kotizon por la kongreso, kiu okazos post du jaroj. La usonaj kaj kanadaj esperantistoj planas organizi grandan karavanon al Pekino por la kongreso. Nemalmultaj esperantistoj, kiuj ne partoprenis en la Vankuvera Kongreso, informiĝinte pri tio, sinsekve sin anoncis al la Universala Esperanto-Asocio. Laŭ fidinda informo, ĝis la fino de februaro ĉi-


jare, pli ol 500 esperantistoj jam pagis aliĝ-kotizon por la Pekina Kongreso.

La Pekina Kongreso sendube estas alloga, sed kion efektive atendas de ĝi la diverslandaj esperantistoj? Kun tiu demando mi intervjuis kelkajn estraranojn de UEA kaj iujn spertulojn.

Unue mi petis opiniojn de s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA.

Ŝjue: "Estimata sinjoro Maertens, kiel prezidanto de UEA, vi multe laboras por la asocio, nia lingvo kaj la movado. Mi sentas grandan honoron, ke hodiaŭ mi povas intervjui vin en Van-kuvero. Preskaŭ ĉiuj esperantistoj, kun kiuj mi parolis en la kongreso, esprimis la deziron partopreni en la 71-a UK okazonta en Pekino. Kiom da esperantistoj venos al Pekino por la kongreso?"

G. Maertens: "Okazigi universalan kongreson en Pekino havas strategian signifon. Ĝi certe



S-ro Yosimi Umeda

multe stimulos la Esperanto-movadon en Ĉinio, eĉ en la tuta mondo. Ni diru, ke el aliaj landoj venos mil kaj du mil. Mi esperas, mil kvincent ĝis du mil estos tie. La reago de multaj esperantistoj estas tre ege favora. Ili volas ne nur kunlabori en tiu strategia signifo de la Pekina Kongreso, sed ankaŭ fari la ponton inter niaj du kulturoj. Mi kredas, ke tio estas la plej interesa flanko de tiu kongreso por la esperantistoj ĝenerale, ke ili povas pli intime, pli persone kontaktiĝi kun la granda kulturo, kiu vivas en Ĉinio, en Pekino. Mi esperas, ke la Pekina Kongreso estos tute alispeca, kaj tre mult-aspekta kongreso ol ni kutimas. Tian mi atendas. Kompreneble, dum la kongreso, ni devas ankaŭ labori, ni devas ankaŭ havi niajn komitat-kunsidojn, ni devas okazigi niajn ĝenera-



S-ro Grégoire Maertens

lajn kunsidojn, tio estas laboro, kio estas interplektita kun la vivo de la Universala Esperanto-Asocio. Tiel ni kongresas ja, sed la ĉirkaŭaĵo de tio, la nacia vespero, la balo, la internacia vespero, la ekskursoj, ktp. povas esti tre allogaj por ni ĉiuj, kaj ni atendas en tio kompletan kunlaboron de la ĉinaj esperantistoj."

S-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA estas japano. Li aparte zorgas pri la okazigo de universala kongreso en Ĉinio.

Ŝjue: "Estimata sinjoro Umeda, vi jam estas nia malnova amiko. Antaŭ nelonge vi dufoje vizitis Pekinon. Mi petas, ke vi, kiel vicprezidanto de UEA, bonvolu diri al mi, kion vi atendas de la Pekina Kongreso?"

Y. Umeda: "Dum tiu ĉi kongreso en Van-kuvero, multaj homoj demandas pri la Pekina Kongreso kaj mi estas certa, ke venos tre tre granda nombro da esperantistoj al Pekino. Mi nur esperas, ke ĉinaj esperantistoj, precipe esperantis-

S-ro Humphrey Tonkin





S-ro Simo Mi-
lojević



S-ino Flóra
Szabó-Felső

toj en Pekino, estos pretaj akcepti sufiĉe multe da eksterlandanoj.

La plej grava afero, kiun eksterlandanoj iom timas, estas la vetero en Pekino. Oni demandas al mi, ĉu la vetero en Pekino en tiu somera tempo estas bona aŭ agrabla kaj mi ne devas ne malkaŝi, ke en tiu tempo de la jaro Pekino estas sufiĉe varma, tamen la ĉinoj pli varme bonvenigos vin, ĉu ne?"

Ŝjue: "Jes, vi diris prave. La ĉinoj estas gastamaj. Dankon."

Sekve mi intervjuis profesoron Humphrey Tonkin, vicprezidanton de UEA.

Ŝjue: "Estimata sinjoro vicprezidanto, ĉu vi bonvolus diri al mi, kion vi atendas de la Pekina Kongreso?"

H. Tonkin: "Volonte. Mi atendas ĉefe du aferojn. Unu estas persona, nome mi volas persone vidi Ĉinion kaj ĉefe vidi Ĉinion en la cirkonstancoj, en kiuj oni povas havi rektan kontakton kun la ĉina popolo, kaj tio kompreneble venos ĝuste de Esperanto, ke ĝi ebligos tion. Mi havas amason da kolegoj, kiuj vizitis Ĉinion, sed ili ne havas ŝancon de rekta kontakto. Tio estas ebla por mi, do de persona vidpunkto, tio interesas min. La dua afero estas tio, ke la Pekina Kongreso povus, kaj mi esperas, ke ĝi markos ian etapon en nia evoluo, nome iun tutmondiĝon por nia movado. Ĉiam en la pasinteco, kiam ni faras kongreson ekster Eŭropo, tio estas, kvazaŭ iri al la periferio, iri al la ekstremaĵoj de nia Esperantomovado, sed kiam ni iras al Ĉinio, pro la forteco de la Esperanto-movado tie, tio estas kvazaŭ iri de la periferio al la centro."

Ŝjue: "Ho, vi faris belan bildon. Inspira parolo. La Pekina Kongreso okazos ĝuste en la jaro antaŭ la centjara jubileo de Esperanto."

H. Tonkin: "Do, eventuale oni povus diri,

malgraŭ tio, ke centjariĝo venos nur en 1987, oni atendu, ke en Pekino oni komencu la duan jarcenton jam en 1986."

D-ino Flóra Szabó-Felső estas ĝenerala sekretario de UEA. Estas ŝi, kiu resumis la kongresojn en la fermo de pluraj jaroj. Dum la kongresaj tagoj ŝi estas ege okupita, tamen mi sukcesis surbendi ĝian voĉon.

Ŝjue: "Estimata sinjorino, mi estas tre ĝoja, ke mi povas revidi vin ĉi tie en Vankuvero. Mi petas, ke vi, kiel ĝenerala sekretario de UEA, iom diru pri la Pekina Kongreso. Kion vi atendas de ĝi?"

F. S. Felső: "Mi jam aliĝis al la Pekina Kongreso. Mi ŝatas partopreni denove en la kongreso post du jaroj kaj precipe ke ĝi okazos en Pekino. Mi atendas de la Pekina Kongreso, ke en Azio ni sukcesas stabiligi niajn jam akiritajn postenojn, kaj ni ŝatas vere havi vastan kontakton kun ĉinaj esperantistoj. Mi iros tien por rigardi, kiel ĉinoj vivas, sed samtempe ni ŝatas ankaŭ porti helpon al ĉinaj esperantistoj. Eble vi jam aŭdis, ke la komitato, akceptinte unu el la rezolucioj, decidis okazigi seminarion por pedagogoj antaŭ la Pekina Kongreso. Ĝia celo estos, ke ni portos eksterlandajn instruistojn kaj ni montros provlecionojn, model-lecionojn por ĉinaj instruistoj, kaj ili instruos tiujn ekstereŭropajn kaj neaziajn instruistojn el ĉinoj, kaj ke la instruistoj povus sekvi tiun modelon kaj sekve daŭrigi la kurson. Do tio estos praktika helpo por ĉinaj esperantistoj. Mi ja konscias, ke ekzistas grandaj problemoj, precipe pri financoj, kaj ni devas ankaŭ solvi tion, ĉar nia celo estas ke la kongreso estu kiel eble plej granda, kaj kiel eble plej multe da ĉinaj esperantistoj havu la praktikan eblecon partopreni ĝin."

Ŝjue: "Tio certe multe helpos la ĉinajn esperantistojn por disvastigi Esperanton kaj disvolvi la Esperanto-movadon."

F. S. Felsö: "Oni devas kompreni, ke ni volas helpi al ĉinaj esperantistoj, ĉar se la Ĉina Esperanto-Ligo estos pli forta, tiam ankaŭ la Universala Esperanto-Asocio estos pli forta."

S-ro Simo Milojević, ĝenerala direktoro de la Universala Esperanto-Asocio, de pli ol dek jaroj servis kiel redaktoro de la influa revuo "Esperanto". Kun aparta zorgemo li nutris la ĉiujaran kongresan numeron de la revuo kun trafaj komentoj pri la kongresoj. Oni ne devas ignori liajn opiniojn.

Ŝjue: "Estimata s-ro ĝenerala direktoro, antaŭ ĉio mi esprimas koran dankon al vi, ke vi klopodas por sukcesigi la Pekinan Kongreson, farante longan vojaĝon inter Pekino kaj Roterdamo. Nun la Pekina Kongreso jam estas definitivigita, do bonvolu diri, kion vi atendas de ĝi?"

S. Milojević: "Mi jam de proksimume 15 jaroj ĉeestas seninterrompe ĉiun el la kongresoj unu post alia. Mi atendas tutan revolucion en la vico en la Pekina Kongreso."

Ŝjue: "Kion signifas la 'tuta revolucio'?"

S. Milojević "Ĝi signifas, ke, se vi bone kalkulas, en Pekino Esperanto estos ĉe la sojlo de sia centjara jubileo, Esperanto povus festi siajn 99 jarojn en Pekino, kaj mi kredas, ke Esperanto-movado bezonas iaspecan revolucion por eniri la duan jarcenton, kaj plej bone ke tiu revolucio okazu en la lando kiu momente havas eble la plej amasan kaj plej intensan Esperanto-movadon. Laŭ mia scio la Universala Kongreso en 1986 estos kunveno kun strategia signifo. Do tio levas multajn praktikajn problemojn kaj ili povas esti solvitaj nur kun la helpo kaj kunlaboro de la ĉinaj aŭtoritatoj. La Universala Esperanto-Asocio jam de pluraj jaroj tre sukcese kunlaboras kun ĈEL. Ni tute ne dubas, ke la kunlaboro estos tre bona kaj la kongreso estos sukcesa."

UEA havas sian konstantan kongresan sekretario, kiu respondecas pri organizo de la ĉiujara Universala Kongreso de Esperanto. La nuna konstanta kongresa sekretario s-ro Diccon Masterman jam sukcese organizis la 67-an UK en Antverpeno kaj la 68-an UK en Budapeŝto, la Vankuvera Kongreso estas lia tria sukcesa kongreso. Liaj konsiloj kaj proponoj eble indas apartan atenton de la Loka Kongresa Komitato de nia lando.

Ŝjue: "Estimata sinjoro Diccon Masterman, mi tre ĝojas konatiĝi kun vi. Mi multe aŭdis pri

vi kaj pri la penigaj laboroj de konstanta kongresa sekretario. Vi jam sukcese organizis tri kongresojn. Mi ege ŝatus scii, kian planon vi havas por la Pekina Kongreso. Kion vi atendas de ĝi?"

D. Masterman: "Iasence mi regas la saman proceduron, kompreneble ĉiu kongreso estas malsama kaj ni devas adapti nin al la malsamaj cirkonstancoj, la malsamaj homoj kiuj laboras por ĝi kaj al tute malsamaj homoj en ĉiu LKK, kiu organizas surloke la kongreson. Kompreneble, kiam temas pri la kongreso en via lando, mi nun frontas al amaso da tute nekonataj problemoj, ĉar nun temas pri du tute malsamaj kulturoj. Mi vere ne konas Ĉinujon, kaj mi klopodas fronti al la kongreso kun absolute neniu antaŭsupozo aŭ antaŭjuĝo, mi klopodas fari la plej bonan solvon por sukcese organizi la kongreson en Ĉinio. Mi kompreneble jam konas ĉinojn relative bone pro tio, ke mi laboris kun vi dum sufiĉe multe da tempo kiel esperantisto, kaj mi estas plena je memfido, ke ni certe povos tre bone kunlabori por veni al niaj komunaj celoj."

Ŝjue: "Antaŭ tio vi povas iri al Pekino por pririgardi. La Ĉina Esperanto-Ligo kaj la ĉinaj esperantistoj bonvenigos vin. Ili klopodos kiel eble plej bone kunlabori kun vi."

D. Masterman: "Mi tre kore dankas. La ĉina gastamo estas tute proverba, kaj mi tre antaŭĝuas viziti vian landon."

Ŝjue: "Ĉinaj esperantistoj renkontos certe multajn praktikajn problemojn kaj malfacilojn. Ili ankaŭ atendas vian helpon, ĉar vi estas sperta en organizado de Universalaj Kongresoj de Esperanto."

(Daŭrigo sur p. 9)

S-ro Diccon Masterman





S-ro Ĉu Tunan (meze), s-ro Ĝang Ĉjiĉeng (maldekstre) kaj s-ro Ĉen Jūan, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, en la kunsido



Fama ĉina intervjuisto s-ro Lu Ji (maldekstre), membro de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, interparolas kun s-ro Lu Ŭejte, membro de la sama

JE la 7-a de aprilo la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" okazigis en Pekino kunsidon, kiun ĉeestis membroj de aliaj lokoj venintaj por partopreni en sesioj de la Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj tiuj, kiuj loĝas en Pekino, sume 30 membroj. La kunsidon prezidis s-ro Ĉu Tunan, prezidanto de la societo. Li mallonge raportis pri la laboro de la societo. Li diris, ke tri jarojn post la fondiĝo de la societo ĝia membraro kreskis de 80 al 136 homoj, kaj plejparto de la novaj membroj estas eminentuloj influhavaj en la socio kaj elstaraj en sia fako. La societo ankaŭ akceptis alilandajn eminentulojn, kiel s-ro Inge-mund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento, interŝanĝis kun ili opiniojn pri Esperanta laboro kaj pliiĝis interkomprenon. S-roj Ĝu Ĝjabi kaj Fang Ĝongbo, membroj en Junnan-provinco, aprobis proponon okazigi la Unuan Esperantan


KUNSIDIS "AMIKOJ

Kongreson de Ĉinio en la provinca ĉefurbo Kunming kaj multe klopodis por tio. S-ro Ĝu Ĝiŝi, unu el la iniciatintoj de la societo, faris multan laboron, ke la Unua Ĉina Simpozio de Scienc-teknika Esperanto sukcesis, kio akcelis la movadon por apliko de Esp. en sciencoj kaj teknikoj en Ĉinio. Dank' al la helpo de s-ro Hŭang Naj, membro de la societo, la Eduka Fonduso de Hŭang Ŝing forte subtenis la Ĉinan Korespondan Esperanto-Instituton. Krome ankaŭ aliaj membroj en Pekino certagrade propagandis kaj disvastigis nian lingvon. S-ro Ĉu Tunan daŭrigis, ke la tasko

S-ro Baj Soŭji (la dua de maldekstre), reprezentanto de la Tutlanda Popola Kongreso kaj profesoro de la Pekina Instru-ista Universitato, en la kunsido



S-ro Liŭ Jongĉjūan (dekstre), vicestro de la Lingva Instituto sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, parolas en la kunsido.





konferenco, vicprezidanto de la Scienc-teknika Komitato de Fuĝjan-provinco kaj prezidanto de la Scienc-teknika Asocio de la provinco.



S-ro Ĝoŭ Guĉeng (meze) parolas en la kunsido. Dekstre sidas s-ino Jang Junju, konsilanto de la Eduka Ministerio de Ĉinio, kaj maldekstre jama ĉina verkisto Je Ĝjunĝjan, membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo.

DE ESPERANTO”

de la societo estas apliki la kapablon de la membroj al la Unua Esperanta Kongreso de Ĉinio kaj la 71-a UK en Pekino.

S-ro Ĝang Ĉjiĉeng, ĝenerala sekretario de “Amikoj de Esperanto”, raportis pri la ĉina Esperanta movado. Li diris, ke en la lastaj jaroj pli kaj pli da homoj en Ĉinio eklernis Esperanton, la movado disvolviĝis profunden kaj tia situacio estas ĝojiga.

S-ro Ĝang Ĉjiĉeng raportis ankaŭ pri la prepara laboro de la 71-a UK. Li diris, ke tiu kon-

greso havas grandan signifon por la ĉina kaj tutmonda Esperanto-movado. La kongreso estas tre atentata de UEA. Ankaŭ la ĉina registaro kaj la koncernaj departementoj zorgas pri ĝi kaj donis al ĝi helpon multflanke. Nun glate iras la prepara laboro. Oni devas ĉiamaniere sukcesigi la kongreson. Li esperis subtenon de ĉinaj esperantistoj.


Fama ĉina historiisto Ĝoŭ Guĉeng, vicprezidanto de la Tutlanda Popola Kongreso, donis varman parolon en la kunsido. Li diris: “Mi studas historion. Nia tasko estas bazi nin sur realo kaj direkti niajn okulojn al la mondo kaj al la estonteco, por ke la mondo fariĝu organika tuto. Esperanto certe povas helpi la mondon en tiu flanko.” Li ĝojis pro la progreso de la ĉina Esperanto-movado en la lastaj jaroj kaj deziris grandan sukceson al la Unua Esperanta Kongreso de Ĉinio kaj la 71-a UK en Pekino.

S-ro Ŝelezo, vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, venas al la kunsidejo.



Per Esperanto tra Ĉinio

de BRUNO VOGELMANN



S-ro Bruno Vogelmann

TRI semajnojn mi vojaĝis tra Ĉinio kune kun alia esperantisto Siegfried Baier el Crailsheim, Germanio. Ni vizitis ok grandajn urbojn Ŝanhajo, Guĵlin, Ĉangŝa, Uhan, Ĉongĉing, Ŝĵian, Langŝou kaj Pekino. Ĉar sinjoro Jang Kajĵuan, estro de la Internacia Turisma Servo de Ĉinio en Ĉangŝa kaj bona esperantisto, preparis nian vojaĝon, ni povis libere aktivi kaj mem elekti kion ni volis vidi.

Ni rigardis la mondfamajn vidindaĵojn: la Grandan Muron, la antaŭe malpermesitan Imperiestran Urbon en Pekino, la havenon, Budho-templon kaj industrieksponon en Ŝanhajo, kie ni vespere ĝuis la arte perfektan Pekin-operon, la najbaran romantikan ĝarden-urbon Suĝou, ŝipveturis sur rivero Liĝĵang de Guĵlin tra pitoreska montaro, vizitis porcelanfabrikon en Ĉangŝa kaj nov-

tipan agrikulturan komunumon, ŝipveturis 1400 km. de Uhan al Ĉongĉing, tra la gigantaj tri gorĝoj de Jangzi-rivero. En Ĉongĉing ni staris nokte sur monto Pipaŝan por admirati la lumomaron de la urbego kaj ĝuis muzikon kaj dancon en parko sur la monto. En Dazhu ni miris pro la multaj roko-skulptaĵoj. Proksime de Ŝĵian ni eniris la ampleksan tombejon de imperiestro Ĉinŝihuang (la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio) kun liaj pli ol 7 000 terakotaj soldatoj, trovitaj en 1974. En Langŝou la interesa provinca muzeo ravis nin per multaj historiaj objektoj, inter ili ja estis la Fluganta Ĉevalo.

Nur kelkajn el la mil vidindaĵoj mi menciis supre. Eĉ pli impresis min la homoj, la amasoj da homoj, la miloj da biciklantoj, ĉiuj trankvilaj kaj respektantaj la aliajn. Mirige estas, ke strataj akcidentoj nur rare okazas. La vizaĝoj de l' homoj montris, ke ili certe estas pli feliĉaj kaj kontentaj ol okcidentuloj, kvankam ili havas nur modestan salajron, minimume 40 jŭanojn, maksimume 200 jŭanojn. Luprezo por loĝejo kostas 5 ĝis 10 jŭanojn. Post aĉeto de la nutraĵo, restas malmulte por aliaj objektoj. Ĉina laboristo devas ŝpari dum jaroj, ĝis kiam li povas aĉeti biciklon. Kaŭzo: rilate la nombron de 1 000 milionoj da homoj, la industrio estas malgranda, 80 procentoj de la popolo estas agrikulturistoj. Kvankam tiuj posedas ĝis nun nur malmultajn maŝinojn kaj laboras preskaŭ ĉie permane, ili produktas sufiĉan nutraĵon

por ke ĉiuj estu sataj kaj sanaj. La plej grava problemo, la nutrado de tiu multnombra popolo estas kontentige solvita.

Post kiam la nova politiko solidiĝis, la ĉinoj persisteme kaj diligente komencis labori. Ĉie estas konstruataj domoj, fabrikoj, stratoj, lernejoj kaj fervojoj. Pro la novstilaj komunumoj, la agrikultura produktado pliiĝis je 25% dum malmultaj jaroj. Tiuj komunumoj unuigas la principojn de persona iniciativo kaj de komuna ekonomio. Ĉiu familio prilaboras proprajn kampojn. Prudenteco kaj diligenteco estas rekompencataj.

Neforgeseblajn impresojn mi spertis dum la multaj kunvenoj kun esperantistoj. En urbo Langŝou ni estis la unuaj eksterlandaj esperantistoj kaj la ĝojo estis granda. En Ŝanhajo same kiel en ĉiuj aliaj urboj mi prelegis pri la temo: Problemoj de la malfrua industria socio. Kvankam kelkaj problemoj de la difektado de la ĉirkaŭmondo ekestis jam nun en la urbegoj de Ĉinio, la miro kaj la intereso estis granda kaj ni ĉiuj esperis ke Ĉinio sukcesos eviti multajn el tiuj difektoj. Ne nur en Ŝanhajo, ĉie ni aŭdis la deziron, ke Azio baldaŭ havu propran UEA-oficejon en Pekino, ĉar Roterdam estas tro malproksima. En Ĉangŝa ni gaje kunestis la faman lunfeston kun la Esperanto-Asocio, kie sinjoro Jang Kajĵuan surprizis nin per serena muziko sur blovharmoniko kaj lunfestaj bakaĵoj. Jang Kajĵuan organizis por ni multajn renkontojn kun

esperantistoj. Koran dankon al li!

En Uhan mi prelegis al la tieaj esperantistoj kaj pasigis kelkajn feliĉajn horojn en la hejmo de mia leteramiko de 30 jaroj Ĝang Danĉen, sindona fervora esperantisto, aŭtoro de lernolibroj kaj de gramatiko. Kia finfina ekvido post sennombraj leteroj, en kiuj ni rakontis unu al la alia pri niaj vivo, aktivajoj, spertoj kaj zorgoj!

Post ŝipvojaĝo supren laŭ Jangzi-rivero ni estis kore bonvenigataj en Ĉongĉing de la tre aktiva Esperanto-Asocio. Baldaŭ mi admiris tie sukcesan laboron sub gvidado de prezidanto Li Ĵen, vicprezidantoj Gu Cuhnĥa kaj Ŭej Jida, redaktoro de la propra eldonejo kune kun Liŭ Zuĝjun. Ankaŭ konsilanton Ĝang ĜongĴen kaj sinjoron Liŭ de la turisma servo ni renkontis. Certe kun multa ofero de energio, tempo kaj mono la Esperanto-Asocio de Ĉongĉing sukcesis varbi 5 000 kursanojn, fondis eldonejon, eldonas monate lernokajeron kaj eĉ eldonis librojn, ĉion sen subteno de aliaj. Imitinda ekzemplo! Sed ĉi-tie kiel aliloke estas problemo kiel ligi la ekskursojn al Esperanto. Laŭ niaj spertoj en Germanio ni rekomendis:

1. Kunveni regule (semajne) post la kurso

2. Serĉi eksterlandajn leteramikojn.

3. Regule legi Esperanto-revuon kaj librojn.

4. Aliĝi al landa asocio, al UEA aŭ al faka asocio.

En Pekino mi renkontis la reprezentantojn de ĈEL, ĈEE, EPĈ kaj Radio Pekino kaj estis fervore akceptataj, ĉar multajn el ili mi konis pro mia kunlaboro kun ili dum la Universalaj Kongresoj.

Ni neniam forgesos nian akompananton Ŝju SenĴong, laboranto ĉe EPĈ, kiu dum kvar semajnoj estis nia interpretisto, kiu zorgis pri nia bonfarto, pri pakaĵoj kaj ebligis multajn renkontojn kun homoj en ĉiuj sociaj tavoloj de l' popolo, de kamparanoj, junu-


loj, laboristoj, instruistoj, profesoroj kaj studentoj, tiel, ke ni povis ekkoni la veran situacion de la homoj, de la familioj, de la ekonomio kaj kultura evoluo.

Sen troigo mi kuraĝas diri: Nur pere de nia internacia lingvo Esperanto ni havis tiom intiman kontakton, kian povis havi nur personoj scipovantaj bone la ĉinan lingvon.

Certe tiu popolo, laboranta diligente kaj pacience, trovos vojon al nova formo de homa socio, verŝajne modela por la tuta Tria Mondo.

Mi tial rekomendas al ĉiuj esperantistoj viziti Ĉinion okaze de la 71-a Universala Kongreso en Pekino. Vi havos neforgeseblajn impresojn kaj travivaĵojn.

S-ro Bruno Vogelmann kun ĉinaj esperantistoj en Langŝoŭ



(Daŭrigo de p. 5)

D. Masterman: "Jes, sed mi eble emfazu, ke ankaŭ mi atendas ilian helpon, ĉar mi ne antaŭvidas, ke mi venos simple por dikti al la ĉinaj esperantistoj kiel fari ilian kongreson, mi venas en la espero, ke mi povos ekzemple diri al ili, jen kiel ni en la pasinteco faris nian kongreson, ĉu tio eblas, aŭ ĉu fakte vi havas alian metodon

por fari aferojn. Mi antaŭvidas, ke ni laboru en atmosfero de komuna kontribuado de ideoj krom komuna interkompreniĝo, malgraŭ tio ke vi, ĉinaj esperantistoj, ne spertas pri la organizado de kongresoj. Vi certe ne estas malspertaj pri la vivo. Vi certe sukcesos."

Ŝjue: "Dankon. Ni ĉinaj esperantistoj faros laŭ nia eblo."

AŬGSBURGO BONVENIGOS VIN



Aŭgsburgo

AŬGSBURGO, situanta en la sudo de FR. Germanio, estas la kongresurbo de la 70a Universala Kongreso de Esperanto en aŭgusto 1985. En la sama jaro Aŭgsburgo festos la dumil-jaran datrevenon de sia fondiĝo.

Aŭgsburgo havas ankaŭ sufiĉe longan Esperanto-tradicion. En 1900 aŭgsburgaj civitanoj fondis Esperanto-grupon. En 1910 okazis Esperanto-Kongreso, unue deklarita kiel Universala Kongre-

so, kiu poste transformiĝis al la 5a Germana Esperanto-Kongreso. Post 1945 la Esperanto-grupo estis unu el la unuaj kulturaj grupoj, kiuj reviviĝis. En 1967 okazis Tutbavara Renkontiĝo, en 1970 la 43a kaj en 1977 la 50a kongreso de Senacieca Asocio Tutmonda. Dum la 56a Germana Esperanto-Kongreso oni inaŭguris Zamenhof-straton. En 1976 refondiĝis Bavara Esperanto-Ligo, kiu nun havas kelkcent membrojn, la sidejo estas en Aŭgsburgo.

Aŭgsburgo ne nur estas taŭga kongresurbo, ĝi ankaŭ estas historia kaj mondfama antikva urbo, kiu estas interesa kaj vidinda por ĉiuspeca turistoj, mallongaj vizitoj kaŭzas ofte tre agrablajn memorojn.

La historiistoj relative ofte menciis la urbon. La Aŭgustus-fontano, konstruita en 1594 prezentas la fondinton de la urbo, la romian imperiestron Aŭgustus, laŭ kiu oni nomas Aŭgsburgon kaj la kongresan monaton.

En sia komenco la antikva Aŭgsburgo estis riĉa urbo, kun pompaj publikaj kaj privataj konstruaĵoj, sed jam de la tria jarcento p. K. la trovitaĵoj el la tomboj rakontas pri dekadenco.

Sekvis jarcentoj. Post la jaro 1000 Aŭgsburgo denove ekfloris. De tiu tempo konserviĝis la katedralo kun la plej malnovaj koloraj vitraloj en Germanio. En 1276 Aŭgsburgo fariĝis sendependa urba respubliko en la Germana Regno. Tiam komenciĝis ekonomia evoluo.

La riĉeco de la urbo altiris kaj subtenis la arton. El la multnombraj aŭgsburgaj artistoj ni mencias nur du: la pentristojn Hans Holbein, patro kaj filo. Ili apartenis al la plej famaj pentristoj de la 16a jarcento.

En la 19a jarcento Aŭgsburgo fariĝis unu el la ĉefaj industriaj centroj de suda Germanio. Rudolf Diesel, filo de aŭgsburga familio, inventis la dizelmotoron, kaj en la jaroj 1893-97 aŭgsburga fabriko perfektigis ĝin de nura projekto ĝis praktika uzebleco. Samtempe kun la ekonomia kresko ekfloris nova kultura vivo. Ekestis kelkaj vere vizitindaj muzeoj, kiel ekzemple Germana Barok-Galerio. Ankaŭ Bertolt Brecht naskiĝis kaj pasigis siajn junajn jarojn en Aŭgsburgo.

La nuna Aŭgsburgo estas vigla urbo kun proksimume 250 000 loĝantoj. En Aŭgsburgo troviĝas multaj industriaj branĉoj de tradiciaj teksaĵ- kaj paper-fabrikoj kaj maŝin- kaj aviadil-konstruado

PAGODOJ DE ĈINIO

de LAN ŠAN



La ligna pagodo en Jingŝjan de Sanŝji-provinco

Foto de ĜOU DONGJUAN

SUR la tero de Ĉinio staras sennombraj pagodoj, kiuj ne nur prezentas la longan historion kaj altan arkitekturon de Ĉinio, sed ankaŭ pli bele ornamas la landon per siaj diversaj elegantaj formoj.

Pagodo estis budhisma konstruaĵo kaj originis el Hindio. Ĝi aperis en Ĉinio kun la enkonduko de budhismo. Oni diras, ke la plej antikva budhisma pagodo Ĝijun en Lŭojang de Henan-provinco estis konstruita de hinda bonzo en la Orienta Han-dinastio en la jaro 67. Kun la budhisma disvastiĝo kaj konstruado de temploj, la pagodoj multiĝis kaj troviĝas ĉie tra Ĉinio.

La pagoda arkitekturo enkondukita en Ĉinion kombiniĝis kun la tradicia arkitekturo de ĉinaj kioskoj kaj pavilonoj kaj ekhavis distingigan ĉinan karakteron. Ankaŭ la ĉinaj taoistoj, islamanoj kaj konfuceanoj konstruis pagodojn kiel la budhistoj, tial en Ĉinio aperis pagodoj de taoismo, islamo kaj konfuceanismo kaj eĉ bonaŭguraj kaj transstrataj pagodoj. Tio faris la ĉinan pagodan arkitekturon pli varia. La nombro de etaĝoj de pagodo ĝenerale estas nepara. La ĉinaj pagodoj havas formojn rondan, kvadratan, sesangulan, okangulan kaj eĉ dekduangulan. Laŭ konstruaj materialoj ili dividiĝas en specojn

de brika, ligna, tera, porcelana, glazurita, ora, arĝenta, kupra kaj fera pagodoj. La pagodoj havas stilojn etaĝan, kioskan, dense plurtegmentrandan, floran, la-maisman kaj vajran.

La ĉinaj pagodoj plejparte estas etaĝaj en plej diversaj formoj. Tiaspecaj pagodoj kreiĝis surbaze de kombino de ĉinaj antikvaj etaĝaj pavilonoj. Iliaj interna strukturo, pordo, fenestro, kolono, trabara strukturo kaj balustrado similas al tiuj de ĉinaj etaĝaj pavilonoj. La etaĝa pagodo ĝenerale estas tre alta kontraste kun la ŝtona kaj fera. Oni povas ascendi sur ĝian supran etaĝon por rigardi la pejzaĝon en la ĉirkaŭaĵo.

La etaĝaj pagodoj nun ekzistantaj en Ĉinio havas diversajn trajtojn. La fama ligna pagodo konstruita en 1056 en Jingŝjan-gubernio, Sanŝji-provinco, bone konserviĝis. Ĝi havas kvin etaĝojn ekstere kaj naŭ ene, kun ses tegmentrandoj, kaj altas je 67.13 metroj. Laŭtakse por ĝin konstrui oni uzis pli ol 3 500 kubmetrojn da ligno kun pezo de 3 000 tunoj. Ĝi estas la plej antikva kaj plej granda ligna pagodo en Ĉinio kaj ankaŭ konata kiel la plej granda ligna pagodo en la mondo.

Kajjŭansi-pagodo en Dingŝjan-gubernio de Hebej-provinco estis

ĝis plej modernaj specialproduktejoj de robotoj. Ankaŭ la nun en Eŭropo multe diskutata katalizilo, kiu senvenenigas aŭtogasojn, estas produktata en la urbo.

Sur la kultura kampo, la urbaj teatroj kaj koncertejoj konstante ofertas riĉan programon. Troviĝas ankaŭ muzik-akademio, kiu portas la nomon de Mozarto. Allogaj estas ankaŭ la ĉiusomeraj liberaeraj operoj kaj prezentado de la tre konata marioneta teatro "Aŭgsburga Pupokesto". Aŭgsburgo estas ankaŭ sporta urbo kun pluraj stadionoj. Aparte fama en la regiono estas la speciala sporto de balon-ŝvebado.

Sed malgraŭ tio, ke Aŭgsburgo estas industri-urbo, en ĝi troviĝas multaj vidindaĵoj, kiuj ĉiujare allogas milojn da vizitantoj. Grandaj publikaj konstruaĵoj, pompaj antikvaj preĝejoj kun vidindaj arttrezoroj, interesaj malnovaj patriciaj domoj kun altvaloraj detalaĵoj, pentrindaj stratanguloj, pordegoj kaj remparoj kuniĝas kun grandaj placoj; belegaj aleoj kaj modernaj larĝaj stratoj alternas kaj tiel kreas urbobildon de malofta kaj okulfrapa diverseco.

Ni kredas, ke la tagoj kaj noktoj pasigitaj de la partoprenantoj de la 70a Universala Kongreso en Aŭgsburgo postlasos al ili belan memoron.

ekkonstruita en 1001 kaj finkonstruita post 55 jaroj. Ĝi, 11-etaĝa, estas la plej alta pagodo en Ĉinio, kun alteco de 84 metroj kaj en formo de okangulo, kaj staras sur alta soklo. Ĝi dividiĝis en partojn internan kaj eksteran, kaj en ĝia mezo spirala ŝtuparo kondukas supren. Ĝi havas multajn niĉojn kun tre belaj freskoj kaj skulptaĵoj. Ankaŭ la pagodo Dajan en la urbo Ŝjian de Ŝenŝji-provinco, la pagodo Hajbaŭ en la urbo Jinĉuan de la Ningŝja-a Hujnacieca Aŭtonoma Regiono, Joŭgŭosi-pagodo en la urbo Kajfeng de Henan-provinco, la pagodo Fejhong en la Supra Gŭangŝengtemplo en la gubernio Hongdong de Ŝanŝji-provinco, la fera pagodo en la templo Juĉjŭan en la gubernio Dangjang de Hubej-provinco, la ŝtona pagodo en la templo Kajjŭan en la urbo Ĉjŭanĝoŭ de Fuĝjan-provinco, ĉiuj estas famaj etaĝaj pagodoj de Ĉinio.

La kioska pagodo konstruiĝis surbaze de kombino de la konstrua formo de ĉina kiosko kaj la tradicia pagoda konstrua formo. Ĝi estas malpli granda ol la etaĝa pagodo. Generale ĝi estas unue-

taĝa, malalta kaj destinita por entombigi bonzon.

La dense plurtegmentranda pagodo estas alta. Ĝiaj tegmentrandoj ekster la pagoda korpo estas unu super alia. La plejparto de tiaj pagodoj estas plena de tero ene. Unu el la famaj troviĝas en la templo Songŝan en la gubernio Dengfeng de Henan-provinco. Ĝi estas 15-etaĝa, alta je 39.5 metroj, majesta kaj eleganta. Ĝi konstruiĝis en 523 p. K. kaj estas la plej antikva brika pagodo en Ĉinio. Estas bone konataj ankaŭ la tri pagodoj en la templo Ĉongŝeng en la Dali-a Bai-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Junnan-provinco. La plej granda el ili estas kvadrata, 16-etaĝa kaj alta je 70 metroj. Ambaŭflanke de ĝi staras po unu okangula, 10-etaĝa brika pagodo. Ili kun la proksimaj lagoj kaj montoj formas originalan pejzaĝon. La Blanka Pagodo en la urbo Ljaŭjang de Ljaŭning-provinco konstruiĝis en 1161-1189. Kun alteco de 71 metroj ĝi estas la plej alta el la samspecaj pagodoj en Ĉinio.

La flora pagodo havas sur sia ronda korpo multajn budhajn


niĉojn, budhajn figurojn, animalajn kaj plantajn desegnojn kaj, rigardate de malproksime, ĝi aspektas kiel giganta bukedo. En Ĉinio troviĝas nur dekkelkaj tiaj pagodoj. En la templo Gŭanghuj de Hebej-provinco troviĝas flora pagodo, kies tria-etaĝa teraso estas tre granda kaj kies korpo malgrandiĝas subite ĉe la supro, tiel ke ĝia supra parto ricevis konusan formon. Ĝi estas tipo de ĉina flora pagodo.

La lamaisma pagodo estas evoluinta el la plej antikva pagodo de Hindio kaj servas al lamaismo. Famaj tiaspecaj pagodoj estas la Blanka Pagodo en la parko Bejhaj de Pekino kaj la Blanka Pagodo en la templo Ta'jŭan de Utaj-monto de Ŝanŝji-provinco. Ilia kalabas-forma ventro sur fortika kvadrata soklo, rigardate de malproksime, aspektas kiel malalta, dika botelo.


La vajra pagodo konsistas el kvin pagodetoj sur granda alta soklo. En Ĉinio estas malmultaj tiaj pagodoj. La vajra pagodo en la templo Ĝenĝjŭe en Pekino konstruiĝis en 1473. Ĝi estas la

(Daŭrigo sur p. 46)


Pagodaro en Cingtungŝja
Foto de **ŜIN HŬA**




Cijjun-pagodo en Lŭojang, Henan-provinco Foto de **JAN ĜIN**



Pagoda en la templo Songšan
Foto de ĜOU ĈINGJUN



*La Pagoda Templo sur Utaj-
montaro en malproksimo*
Foto de ĜOU DONGJUAN







Tri pagodoj en la templo Ĉongŝeng Foto de LAŬ BAJ

*Pagodaro okcidente
de la templo Ŝaŭlin* Foto de JAN ĜIN







La vajra pagodaro en la templo Ĝenĝjue
Foto de ŜJU ŜJANGĜJUN



La Blanka Pagodo en la parko Bejhaj Foto de ĈJU ŬEJBO



Antikva pagodo en la urbo Jangĝoŭ
Foto de JAN ĜIN



MALFERMITAJ URBOJ



La haveno Nantong
Foto de ĜANG
ĈANGĜJANG



*Kolora brodaĵo, fama
loka metiartaĵo*
Foto de ŜJŬE ĈAŬ



*En la Dua Tekstila Fa-
briko de Nantong*
Foto de ĜANG
ĈANGĜJANG

La urbo Nantong situas en la centra parto de la provinco Ĝjangsu, ĉe la norda bordo de Jangzi-rivero. Ne malproksime de la urbo estas la Flava Maro. Norde ĝi interligiĝas kun kvar kanaloj kaj sude ĝi frontas al la urbego Ŝanhajo kaj prospera regiono de la provinco trans la rivero. Norde estas vasta Nord-Ĝjangsu-a Ebenaĵo. Nantong estas unu el la bazoj de sinteza produktado de eksportaĵoj de Ĉinio, kaj ŝlosila loko de en- kaj eksportado ĉe la baseno de Jangzi-rivero. Cetere la urbo estas grava konsistiga elemento de la Ŝanhaja Ekonomia Areo (la areo inkluzivas Ŝanhajon kaj kvar provincojn Ĝjangsu, Anhuj, Ĝeĝang kaj Ĝjangŝji). Nantong administras du distriktojn kaj ses guberniojn kun totala areo de 8 000 kvadrataj kilometroj kaj 7.41 milionoj da loĝantoj. La urbaj kvartaloj ampleksas 121

kvadratajn kilometrojn, kie loĝas 390 mil loĝantoj.


La urbo situas sur la aluvia ebenaĵo de Jangzi-rivero. La fekunda tero kaj varmeta klimato faras la lokon landfama bazo de kotono-produktado. Cetere la loko produktas menton, lancmenton, juton kaj aliajn porindustriajn plantaĵojn. La tiea kotona produktokvanto estas granda, kvalito bona, kaj fibro longa. Ĝi estas uzata kiel materialo por delikataj ŝpinaĵoj kaj ŝtofoj. Ankaŭ la produktokvanto de kokono estas la plej alta en la provinco.

La urbo, kun 200-kilometra marbordo kaj 120 000-hektara plaĝo, produktas ĉinajn harinigojn, skombrojn, angilojn k. s. Tiel la jara produktokvanto de fiŝoj konsistigas duonon de tiu de la tuta provinco. La plaĝoj estas tre konvenaj por meretriksoj (*Meretrix meretrix*) kaj alispecaj


konkoj, kaj la kvanto de eksportataj meretriksoj superis 60 procentojn de tiu de la tuta lando.

Nantong estas unu el la urboj, kie la ĉinaj modernaj industrioj estas kompare frue disvolviĝintaj, kaj la industria bazo kaj teknikaj fortoj potencaj. Krom la malpeza industrio kaj tekstilado kiel la ĉefa parto, la urbo posedas sisteman industrion de maŝinfabrika, elektronika, kemio, farmacio, konstruado, konstrumaterialo, ŝipfarado, elektro k. a. En 1895, nacia industriisto Ĝang Ĝjan fondis tie la unuan tekstilan fabrikon de Ĉinio, kaj de tiam la urbo iom post iom fariĝis unu el la tekstilaj bazoj de nia lando. Post la Liberiĝo en 1949, la tiea tekstilado disvolviĝis tre rapide. Nun la urbo posedas 48 000 spindelojn, 26 000 teksmaŝinojn kaj 28 000 spindelojn por lanfadejoj. Ĉiujare la urbo povas tinkturi 200 milionojn da metroj da

La pitoreskejo Langŝan



La Kondensila Fabriko de Nantong provizita per importita avangarda ekipaĵo produktas kondensilojn eksportotajn.



ŝtofoj. La urbo povas ŝpini kotonon, lanon, juton, silkon kaj kemian fibron. Nun la urbo produktas ŝtofojn de 6 500 varioj de 830 specoj de 15 kategorioj. Ĉ. 100 specoj estas eksportataj al pli ol 60 landoj kaj regionoj. Ankaŭ la maŝinfarado ĝuas renomon. La universala frezmaŝino kaj ciferregata universala frezmaŝino estis honoritaj de la Maŝinfabrika Ministerio kiel "fidebla produktaĵo", kaj la eksportitaj maŝinoj konsistigas pli ol 90 procentojn de tiuj de la tuta lando. Lastatempe rapide progresas ankaŭ la elektronika industrio de Nantong. Bone bazitaj fabrikoj produktas multspecajn elektronikajn pecojn kaj aparatojn, kiuj estas universale adapteblaj. Ankaŭ la kolora vido-registriilo, komputero, industria televidilo kaj praktika instrumento atingis bonan nivelon.


Nantong posedas 200 mil konstruistojn kun certgrada tek-

nika nivelo, kiuj povas plenumi taskon de starigo de modernaj konstruaĵoj. Nun ili laboras en pli ol 20 provincoj kaj municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio kaj iuj en aliaj landoj. Ilia laboro ĝuas altan renomon interne de nia lando pro la granda rapideco kaj bona kvalito.

La surakva kaj surtera transportado de Nantong estas kompleta. Pere de Jangzi-rivero, la naviglinioj sin etendas al 15 provincoj kaj urboj; kaj pere de la mara navigado la haveno ligiĝas kun multaj landoj. La haveno de Nantong longas 26 kilometrojn. Tie la rivero Jangzi estas 8-16 km larĝa kaj 11-20 m profunda. En la haveno povas ankriĝi 30 000-50 000-tonelaj ŝipoj. La bordo estas rekta, la navigejo imuna kontraŭ sedimentiĝo, glaciĝo kaj tajfuno, kaj la naviglinio funkcias tutan jaron. Dank' al la bonaj naturdotitaj kondiĉoj, la haveno fariĝis ŝirmejo por ŝi-

poj. Ĉe Langŝan de Nantong estas 6 500-kvadratmetra ŝedo por ŝarĝado. Nun en Nantong 24 mar-ŝipoj povas esti samtempe ŝarĝataj. Alloga estas la promesdona perspektivo de la haveno. Fremdlandaj fakuloj asertis post enketado, ke la favoraj kondiĉoj de la haveno Nantong promesas aperon de granda haveno kun jara ŝarĝkapablo de cent milionoj da tunoj da kargo.

Dank' al la naturdotitaj kondiĉoj kaj la rapida progreso en la lastaj jaroj, Nantong ekokupis la 5-an lokon inter la 33 bazoj de ĝenerala produktado de eksportaĵoj. Nun la urbo negocas kun pli ol 90 landoj kaj regionoj. Ekde 1978 Nantong enkondukis el Japanio, Usono, Britio, Italio, FR Germanio, Hongkongo, Aŭmeno kaj aliaj landoj kaj regionoj avangardajn teknikojn kaj ekipaĵojn. Glate iras entreprenoj investitaj per ĉina kaj fremdlanda kapitaloj. Prosperiĝo de la urbo



Vigla kajo

*Tiu kompanio en Nantong produktas son-
bendojn kaj pecojn de elektraj aparatoj.*

Foto de **ŜJŬE ĈAŬ**





La bela urbo

Foto de ĜANG ĈANGĜJANG

La fabriko de virinaj por-laboraj ŝuoj administrata kune de Nantong kaj Japanio

Foto de ŜJŬE ĈAŬ



hardis kaj spertigis multajn funkciulojn.

Disvolviĝo de ekonomia konstruado akcelis poŝto-telekomunikadon, publik-utilajn aferojn, sciencojn, kulturon, edukadon, medicinon k. a. En 1984 la urbo estis ekipita per telekablo kaj aŭtomata telefonio inter Nantong, Ŝanhajo kaj Nankino kaj moderna telekomunika domo estas konstruata. Cetere, la urbo ekipis sin per 10 000-kanala cifereprograme regata konektilo kaj

400-linea programe regata longdistanca konektilo. Nantong havas 40 scienc-esplorajn instituciojn, 4 200 lernejojn de diversaj gradoj, inter kiuj estas 31 mezgradaj teknikaj lernejoj kaj 10 superaj lernejoj. La klereco de la tieaj loĝantoj estas kompare alta. En la urbo estas 13 000 nomumitaj sciencistoj kaj teknikistoj, inter kiuj pli ol 3 000 estas fakuloj en nivelo de inĝeniero kaj pli.

Nantong havas ne nur prospe-

ran ekonomion, sed ankaŭ belajn pejzaĝojn. La urbo estas ĉirkaŭita de Haŭhe-rivero, super kiu ambaŭborde sin klinas salikoj. Kioskoj, pagodoj, pontoj kaj palafitoj kune formas harmonian tuton. Langŝan en la suda antaŭurbo estas unu el la famaj naturaj pejzaĝoj de Ĝjangsu-provinco. Tie estas multaj antikvaj konstruaĵoj. La Umea Arbaro, Bejlugaĝardeno, Nanĝjaŭ-parko, Ŝujhugaĝardeno k. a. per sia aparta beleco allogas turistojn.

La leviĝanta terciara industrio de Ĉinio

MIA familio el kvin membroj disponas du ĉambrojn kun totala areo de 20 kvadrataj metroj. Antaŭ nelonge ok parencoj samtempe venis de mia hejmvilaĝo kaj volis loĝi kelkan tempon en Pekino. Mi devis loĝigi kelkajn el ili en gastejo. Mi iradis du tagojn tra la urbo, sed ĉiuj gastejoj estis plenplenaj. Cetere mi vidis, ke multaj pasaĝeroj tranoktis en la atendejo de la Pekina Staci-domo pro tio, ke ili ne sukcesis trovi gastejon. Matene kaj vespere, en la kulminaj horoj, oni malfacile povas sin enpuŝi en aŭtobuson, malgraŭ ke ili jam atendis duonhoron. Kaj krome, oni devas longe vikatendi en vendejo, serĉi infanĝardenon por sia infano kaj akompani maljunulojn al kuracejo. . . tiaj problemoj tre lacigas la homojn.

La nombroj de la komercaj, restoraciaj, servaj kaj riparaj punktoj kaj ties oficistoj en Pekino kaj iuj aliaj urbegoj de Ĉinio estas tro malmultaj kompare kun tiuj de evoluintaj landoj. Mi prenu Tokion kiel ekzemplon. Tokio havas 300 000

punktojn kun 1.95 milionoj da oficistoj, dum Pekino nur 49 000 kun 0.384 miliono da oficistoj.

En la lastaj jaroj, por solvi la malfacilojn en la popola vivo, la diversaj lokoj de Ĉinio komencis atenti disvolvon de la terciara industrio.

“Por radikale ŝanĝi la aspekton de la terciara industrio de Pekino, ni devas atingi grandan sukceson ĉu en la gvida penso, ĉu en la konkretaj metodoj,” diris Ĉen Jŭan, respondeculo de la ekonomia gvidgrupo de la pekina magistrato, kiam mi intervjuis lin.

Li diris, ke la pekina magistrato turnos sian gvidan penson por la ekonomia laboro ĉefe al disvolvo de la terciara industrio. La strategia celo de disvolvo de la socia ekonomio de Pekino estos kvarobligi ne sole la totalan produktovaloron de industrio kaj agrikulturo, sed ankaŭ la totalan naci-ekonomian produktovaloron, inkluzive tiun de la terciara industrio. Tio estas radikala ŝanĝo de la ekonomia politiko de Pekino kaj aliaj urboj. Multaj organizoj persistas en la principoj “fari ĉefe unuspecan entreprenadon kaj samtempe preni ankaŭ aliajn okupojn” kaj “samtempe disvolvi la terciaran industrion de la ŝtato, kolektivo kaj individuo”. Dank’ al tiuj principoj nova ŝanĝiĝo okazis al la terciara industrio de Ĉinio.

La hotelo “Oriente” en Kantono



BAZARO EN ĈINGHŬA-UNIVERSITATO

Ĉinghŭa-universitato estas unu el la plej grandaj universitatoj de Pekino. En la pasinteco pli ol 30 000 instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj kaj iliaj familianoj prenis manĝon en la universitato. Por aĉeti manĝaĵon ili devis longe vikatendi en la manĝejoj. Se instruistoj volis mem prepari manĝaĵojn, ili ofte ĉagreniĝis pro malfacila akiro de almanĝaĵoj. Iuj instruistoj plendis: “Ni pasigas matenon en hasteco kaj tagmezon kiel en batalo, ni fariĝas lacaj en vespero kaj ŝarĝiĝas per laboro en dimanĉo.”

Por ŝanĝi tian situacion, la universitato decidis fondi sian terciaran industrion. Lastatempe en

la universitato aperis bazaro, en kiu etkomercistoj el Tjanĝin, Hebej, Ĝeĝjang kaj aliaj lokoj kaj komizoj de ŝtataj butikoj starigis pli ol 20 standojn kaj vendas legomojn, kokojn, fiŝojn, fruktojn, kukojn, panojn kaj ĉiutagajn bezonaĵojn, kaj en kiu servas ankaŭ tajloroj.

En la bazaro mi renkontis instruiston pri meĥaniko, kiu ĵus aĉetis fungojn. Li diris al mi: "Mi kaj mia edzino ĉiutage devas iri al laboro kaj nia infano al lernejo. Ni ne havas tempon por iri al vendejo ekster la universitato. La bazaro multe oportunitigis nian vivon. Jen la fungoj kaj brasiko, jam sufiĉaj por nia hodiaŭa vespermanĝo."

Por faciligi la vivon de la urbanoj, iuj entreprenoj de Pekino komencis diversajn servojn de la terciara industrio.

En Pekino estas iu ĝenerala maŝina kompanio. En la lastaj jaroj, pro la reordigado kaj reformado de entreprenoj, parto de ĝiaj oficistoj fariĝis superflua. La kompanio establis ĉ. 30 entreprenojn por la terciara industrio. Ili riparas elektra-maŝinajn ekipaĵojn kaj hejmajn elektrajn aparatojn, respondas al la konsultantoj pri tekniko kaj administrado, liveras informojn, funkciigas gastejojn, restoraciojn, infanvartejojn kaj vestofarejojn. Ĉiuj tiuj entreprenoj servas kaj al la oficistoj de la kompanio kaj al la socio. Dank' al sia fondiĝo la entreprenoj altigis la enspezon de la oficistoj kaj donis al la ŝtato pli da profito.

PASLOĜADO KAJ MANĜADO EN KANTONO

Antaŭ unu-du jaroj, Kantono devis pasloĝigi turistojn ofte en gastejoj de la najbaraj urboj pro siaj nesufiĉaj hoteloj kaj gastejoj. Lastatempe la malfacilo iom post iom solviĝis. En Kantono nun estas pli multaj gastejoj luksaj, mezklasaj kaj simplaj. Ĝia ĉefa metodo por la solvo de la problemo estis konstrui grandajn modernajn hotelojn, kiaj "Blanka Cigno", "Ĉinio" kaj "Ĝardeno". Samtempe kun tio multaj malnovaj hoteloj estis renovigitaj kaj ekipitaj per centra klimatizilo, fumsentema brul-alarmilo, komputera telefonio kaj ferm-cirkvita televidilo. Same kiel en aliaj urboj, la gastejoj de iuj institucioj kaj altlernejoj malfermiĝis al la socio. Antaŭe la ŝtato respondecis pri la profito kaj perdo de tiuj gastejoj, kiuj akceptis nur gastojn de siaj institucioj kaj malprofitis pro tio. Nun ili servas al la publiko. Pasintjare, kiam okazis la Aŭtuna Foiro en Kantono, la senprecedence multaj gastoj pasloĝis en la urbo, kio estis la unua fojo en la lastaj 7-8 jaroj.

Por solvi la problemon de manko de manĝejoj, pli ol dek luksaj restoracioj kaj tetrinkejoj establis filiojn, kiuj formis manĝaĵo-straton Mejŝilin. Ĉiutage la straton frekventas sennombraj klientoj, kaj ĉiutage vendiĝas pli ol 10 000 skatoloj da manĝaĵoj de pli ol 20 specoj kaj ĉiu skatolo kostas nur 1-1.5 jŭan-ojn (2.8 jŭan-oj egalas al unu usona dolaro). Tial la proksimaj oficistoj, studen-

"Hejmo de Studentoj" en Ĉinghŭa-universitato



En la manĝaĵo-strato Mejŝilin de Kantono



toj kaj domkonstruistoj tre ŝatas la straton. Mejŝilin ne nur alportas oportunon al la popolo, sed ankaŭ donas sperton por funkciigi pli multajn krakmanĝejojn.

Mi informiĝis, ke la distriktoj Dongĉeng, Ŝjiĉeng, Ŝjüan-u, Ĉong'üen, Fengtaj kaj Ŝiĝingŝan en Pekino sin preparas por konstrui sian manĝaĵo-straton. La satelitaj urboj de Pekino estas konstruantaj sian komercan straton, manĝaĵan straton kaj kulturen centron.

LA ROLO DE KOLEKTIVAJ KAJ INDIVIDUAJ ENTREPRENOJ EN URBOJ

La vigliĝo de la terciara industrio solvis iujn malfacilojn de la popolo en ĝia ĉiutaga vivo.

Proksime de Ĝjaŭtong-universitato de Ŝanhajo estas librejo Zili, kiu vendas librojn ĉefe soci-sciencajn, kulturajn, edukajn, scienc-teknikajn kaj literaturajn. Proksimaj lernantoj, inĝenieroj kaj teknikistoj fariĝis ĝiaj konstantaj klientoj. Kelkaj studentoj donacis al la librejo silkan flagon kun tiaj vortoj "EMINENTA MENTORO, HELPEMA AMIKO".

Abituriento Gu Dehüa fondis vestofarejon antaŭ kvar jaroj. Kiel bona tajloro, li pagigas racie kaj plenumas mendojn akurate, tial eĉ fremdlandanoj venis al li por mendo. Nun la popolo ŝatas modajn vestojn. Multaj mendis ĉe li vestojn novfasonajn. Ekde la lasta jaro, kiam furoris eŭropa kostumo, Gu akceptas pli kaj pli da klientoj.

En foiro okazinta en Pekino por kolektivaj kaj individuaj entreprenoj, mi informiĝis, ke ĝis la fino de 1984, la urbo havis pli ol 7 700 punktojn de kolektiva ekonomio, en kiuj laboris pli ol 330 000 homoj. Cetere ĝi havis pli ol 17 000 familiojn kun pli ol 22 000 homoj okupiĝantaj pri individuaj industrio kaj komerco. La tetrinkejo Ĉjanmen kaj la servejo Daĝalan, kiuj antaŭ kelkaj jaroj vendis nur teon, jam fariĝis komercaj kompanioj kun jara profito de pli ol du milionoj da jüan-oj. En la lastaj kvin jaroj oni fondis en Pekino pli ol 200 kolektivajn kudrejojn, vestofarejojn kaj trikejojn, kiuj ĉiujare faras 17 000 000 vestojn. En la urbo servas ankaŭ 1 300 individuaj kudrejoj kaj vestovendejoj, 688 kolektivaj restoracioj kaj manĝejoj, 1 200 individuaj manĝejoj kaj 271 gastejoj kun pli ol 27 000 litoj, kiuj konsistigas pli ol 40% de la totala nombro de la hotelaj litoj de la urbo. Krome oni fondis plurajn taksio-kompaniojn kaj triciklajn servojn.

KAMPARANAJ ENTREPRENOJ EN URBOJ

En la lastaj du jaroj la ĉinaj kamparanoj plene montris sian talenton en la kamparo, kaj post kiam la registaro publikigis novajn politikojn pri la kampara ekonomio, ili penetrigis sian ekonomian forton en urbojn. La kamparanoj-entreprenistoj direktis sian atenton unue al la terciara industrio, tre malforta branĉo en la urboj.

La mez- kaj malgrandaj urboj vigliĝis la unuaj. Nekompleta statistiko diris, ke 250 000

En kolektiva vestofarejo de Pekino



kampanoj de la subprovinco Anĉing de Anĥuj-provinco iris en urbojn por okupiĝi pri la terciara industrio. Kampanoj de la subprovinco Handan de Hebej-provinco investis pli ol 50 milionojn da ĵuan-oj por komercaj kaj servaj entreprenoj en urboj kaj la sumo estis kvinoblo de la ŝtata investo al la urbo Handan.

La kampanoj en la antaŭurboj de grandaj urboj klare vidis, ke starigi hotelojn kaj manĝejojn en grandaj urboj estas vojo por ilia riĉiĝo. Ĝis la fino de 1984 jam 100 000 kampanoj iris en Ĉongĉing, la plej grandan urbon en sudokcidenta Ĉinio. Nun tie iliaj hotelaj litoj konsistigas ĉ. trionon de la totala nombro de la hotelaj litoj de la urbo. La kampanoj de Jujŭantan de antaŭurbo de Pekino, kiun mi iam vizitis, estas pli ambiciaj. Post 1980 ili fondis naŭ ordinarajn gastejojn, kiuj akceptas ĉiujare pli ol 200 000 gastojn. Ili konstruis luksan hotelon Ziju, kiu inaŭguriĝis en septembro pasintjare: la 22-etaĝa Jujŭan-hotelo estas en konstruado kaj la pli luksa Juŝji-hotelo estas en projektado.


Naŭ kampanoj de Liŝuj-gubernio de Ĝeĝang-provinco fondis butikon. Ĝi vendas ĉefe

novtipajn produktaĵojn de la loko kaj estas tre bonvena al la kampanoj. Iu kampano diris, ke li foje veturis kelkcent kilometrojn por aĉeti bonspeciajn vitojn kaj malsukcesis, sed fine li akiris tiajn en la butiko. La kampanoj-komizoj de la butiko servas ĉiam afable. Iu aliloka kampano skribis al la butiko por aĉeti malpli ol unu kilogramon da semoj de ia glueca rizo. La butiko rapide plenumis lian peton.

Nun la terciara industrio de kampanoj disvolviĝas en pli multaj flankoj. Post kiam kampanoj de la antaŭurbo de Uhan de Hubej-provinco fondis en la urbo la unuan amuzan centron, rulglitejon kaj balsalonon, kampanoj de diversaj lokoj starigis unu post alia amuzejojn, kinejojn, turismajn servojn, taksio-kompaniojn k.s.

La okcidentaj evoluantaj landoj en sia industriigo senescepte spertis la procezon, ke granda nombro da kampanoj iras al la urboj kiel laboruloj. Sed sur la vojo de modernigo de Ĉinio aperis alia situacio: La riĉiĝintaj kampanoj venis en la urbojn kiel investantoj por establi entreprenojn. Nemalmultaj fremdlandaj observantoj nomis tion "miraklo en la historio de ekonomia disvolviĝo".

En la nova hotelo Ziju administrata de kampanoj





Ĉefministro Gaŭ Zijang parolas en la Tutlanda Scienc-teknika Konferenco.

La Tria Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio inaŭguriĝis la 27-an de marto en la Popola Halo de Pekino. Jen la kongresejo.

PRI LA TRIA SESIO DE LA SESA TUTLANDA POPOLA KONGRESO DE ĈINIO

DE la 27-a de marto ĝis la 10-a de aprilo okazis en Pekino la Tria Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi estis kunvokita en la situacio, ke Ĉinio komencis reformi la ekonomian sistemon kun la emfazo de tiu en la urboj. La celo de la sesio estas diskuti pri la politikoj de la socialisma ekonomia konstruado kaj reformado de la ekonomia sistemo.

En la sesio ĉefministro Gaŭ Zijang faris raporton pri la registara laboro. Li montris, ke estas tre bona la ĝenerala situacio de la ĉina ekonomio kaj jam prezentiĝas perspektivo de bona cirkulado de la nacia ekonomio. Li emfazis, ke en la kurantjara reformado Ĉinio devas daŭre vigligi sian ekonomion, akceli la leviĝon de la ekonomia efiko de ĉiuj flankoj kaj fari gravan paŝon por reformi la salajran kaj prezan sistemojn.

La sesio aprobis la naci-ekonomian kaj soci-disvolviĝan planon proponitan de la

Ŝtata Konsilantaro por 1985, ekzamenis la plenumadon de la ŝtata budĝeto de 1984 kaj aprobis la ŝtatan budĝeton prezentitan de la Ŝtata Konsilantaro por 1985.

La sesio kontentis pri la sukcesa solvo de la problemo de Hongkong per intertraktado de la registaroj de Ĉinio kaj Britio. La sesio aprobis la Kunan Deklaron de la Registaroj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Unuigita Reĝlando de Granda Britio kaj Nord-Irlando pri la Problemo de Hongkong, subskribitan de ĉefministro Gaŭ Zijang je la 19-a de decembro 1984 en la nomo de la ĉina registaro, inkluzive de ĝiaj tri akcesoraj dokumentoj.

La sesio aprobis ankaŭ la Heredan Leĝon de la Ĉina Popola Respubliko kaj la decidon rajtigi la Ŝtatan Konsilantaron ellabori provizorajn kondiĉojn aŭ regularojn pri reformado de la ekonomia sistemo kaj malfermo al la eksterlando.

Ekonomiaj leĝoj de Ĉinio en la ekonomia struktura reformo

DE 1978 Ĉinio ekpraktikis la politikon vigligi la ekonomion enlande kaj malfermi la pordon al eksterlando kaj faris serion da gravaj reformoj laŭplane unue en la kamparo kaj poste en la urbo. En la pasintaj pli ol ses jaroj la ondo de la reformo rompis la malnovan modelon de la ekonomia strukturo de Ĉinio kaj puŝis la ĉinan nacian ekonomion al la vojo de moderna disvolviĝo. Dank' al tio la ĉina ekonomio akiris senprecedencajn sukcesojn. Por garantii kaj akceli la reformon Ĉinio komencis starigi kaj perfektigi siajn ekonomiajn leĝojn.

Ĉinio estas socialisma lando kun plurspecaj ekonomiaj elementoj kaj tre komplikaj ekonomiaj rilatoj. Laŭ la reala stato, Ĉinio devus havi kompletan da konvenaj ekonomiaj leĝoj por administri la ekonomiajn aktivadojn. Tamen, dum longa periodo, rezulte de la historiaj, politikaj kaj ideologiaj kondiĉoj, formiĝis rigida modelo en la ĉina ekonomia strukturo, nekonforma al la disvolviĝo de la sociaj produktaj fortoj. Limigite de la modelo, oni neglektis la rolon de var-produktado, leĝo pri valoro kaj merkato kaj troe uzis administrajn rimedojn kaj instrukciajn planojn por administri komplikajn ekonomiajn aktivadojn. Tio faris la socialisman ekonomion, kiu devis esti vigloplena, perdinta vivforton en konsiderinda grado.

Dank' al la reformo rompiĝis la antaŭaj rutinoj kaj ekvigliĝis diversaj ekonomiaj elementoj. Inter entreprenoj, departementoj kaj regionoj iras diversaj kunlaboroj kaj konkurencoj, multaj eksterlandaj entreprenoj faras en Ĉinio investadon kaj komunan entreprenadon. Evidentiĝis, ke la solaj administraj rimedoj kaj instrukciaj planoj ne povas adaptiĝi al la ekonomia disvolviĝo, kaj sekve ellaboro de la leĝoj pri ekonomio devis esti metita en nian tagordon. Por adaptiĝi al la bezono de la reformo de ekonomia strukturo kaj rapidigi la ellaboron de la leĝoj, en la lastaj jaroj la centra registaro, ĉiuj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj tra la tuta lando starigis siajn ekonomiajn justicojn kaj esplorajn centrojn de ekonomiaj leĝoj. En aŭgusto 1984 fondiĝis la Instituto pri la Ĉinaj Ekonomiaj Leĝoj. En la pasintaj pli ol ses jaroj la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro sinsekve aprobis kaj publikigis pli ol 200 ekonomiajn kodojn. Publikigo de tiel multaj ekonomiaj kodoj en tiel mallonga tempo estis senprecedenca en la leĝo-dona historio de la nova Ĉinio. En la venontaj du jaroj ankoraŭ ĉ. cent ekonomiaj kodoj estos donitaj al la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj la Ŝtata Konsilantaro por ekzameni kaj aprobi.

Industrio estas la gvidaj fortoj

de la nacia ekonomio kaj la industriaj entreprenoj—bazaj unuoj de la moderna socia ekonomio. La mankoj de la tradicia ekonomia strukturo de Ĉinio manifestiĝis en tio, ke la ŝtato administris la entreprenojn tro multe kaj tro rigide. Tio katenis ilin kaj malhelpis ilian disvolviĝon. Por grandigi la aŭtonomecon de la entreprenoj kaj elvolvi ilian aktivecon, certigante la pozicion de entreprenoj kiel relative sendependan ekonomian organizaĵon en la reformo, la ŝtato publikigis la "Difinoj pri Disvastigo de la Administra Aŭtonomeco de Ŝtataj Industriaj Entreprenejoj", "Difinoj pri Profito-deteno de Ŝtataj Industriaj Entreprenejoj", "Leĝo pri la Ŝtataj Industriaj Entreprenejoj" kaj aliajn leĝojn por ordigi la rilatojn inter la ŝtato kaj la entreprenoj kaj levi la aktivecon de la entreprenoj.

La reformo de la kampara ekonomia strukturo estas antaŭiranto de la ĉiufanka reformo de la ĉina ekonomia strukturo. Dank' al plena efektivigo de la respondeciga sistemo de laŭkontrakta produktado en la lastaj jaroj, granda ŝanĝiĝo okazis en la ĉina kamparo. Por ke la kampara ekonomio disvolviĝu al specialigo, var-produktado kaj modernigo, la ŝtato publikigis la "Difinoj pri Kelkaj Problemoj en Disvolvo de Komunumaj kaj Brigadaj Entreprenejoj", "Difinoj pri Kelkaj Problemoj en Disvolvo de Agrikultura Ekspluatado kaj Agrikul-

turo-Industrio-Komerca Kompanio”, “Provaj Difinoj pri Kelkaj Problemoj en Reformo de Kampara Varo-cirkula Sistemo” kaj aliajn koncernajn leĝojn por akceli la pluapaŝan disvolvigon de la kampara ekonomio.

Ĉar oni alte taksas la komercaĵan ekonomion kaj la rolon de la leĝo pri valoro, la produkta kaj labora interŝanĝo inter la varo-produktantoj devas esti farata en kunlaboro kaj laŭ kontraktoj de egaleco kaj reciproka profito kaj interŝanĝa principo de egala valoro. Ĉinio publikigis la “Leĝo pri Ekonomiaj Kontraktoj” en 1981, kiu difinis la interŝanĝajn rilatojn de varoj inter ekonomiaj organizoj en formo de

leĝo, kaj poste sinsekve difinojn pri riĉaĵo-asekuro, laŭkontrakta inĝenierado, laŭkontrakta prilaborado kaj monprunto, tio pluapŝe konkretigis la leĝon pri varo-interŝanĝo.

La patenta leĝo, ekpraktikita la 1-an de aprilo ĉi-jare, koncentrite enkorpoigis la deziron de Ĉinio respekti sciencajn kaj teknikajn sciojn kaj protekti intelektajn fruktojn. La praktikado de la patenta leĝo kuraĝigis la ĉinajn sciencistojn kaj teknikistojn en ilia inventado kaj kreado, malfermis teknikan merkaton kaj kreis favorajn kondiĉojn por enkonduki alilandajn avangardajn teknikojn, kio estas multe laŭdata en la mondo.

Kun la disvolviĝo de nia ekonomia interŝanĝo kun aliaj landoj, iom post iom perfektigas la ĉinaj ekonomiaj leĝoj koncernantaj aliajn landojn. La ŝtato publikigis serion da kodoj pri impostado, registrado, administrado de laboro kaj alilandaj valutoj kun la “Leĝo pri Ĉina-Alilanda Komuna Entreprenado” kaj la “Leĝo pri Ĉina-Alilandaj Ekonomiaj Kontraktoj”.

Kun la ekonomia leĝdona perfektigo Ĉinio transiras iom post iom de simpla uzo de administraj rimedoj al la nova organiza formo kaj gvida maniero, kiuj uzas ne nur administrajn, sed ankaŭ ekonomiajn kaj jurajn rimedojn por administri la ekonomion.

HUMURAĴOJ ĈINAJ KAJ ALILANDAJ

ĈAMPIONECO

A: “Kiel vi amuziĝis en la Kultura Palaco?”

B: “Plezure. Mi venkis la ĉampionojn de ŝakludo kaj teniso.”

A: “Admirinde. Kiel vi venkis la rivalojn?”

B: “Mi ludis ŝakon kun la ĉampiono de teniso kaj ludis tenison kun la ĉampiono de ŝakludo.”

PROFITO EL FILATELO

Patrino fiere diris al gasto: “Filatelado klerigas homojn. Se vi ne kredas, ni pruvu tion ĉe mia filo.” Ŝi turnis sin al sia filo kliniĝanta super sia poŝtmarkalbumo: “Eriko, kie estas Hungario?”

“Du paĝoj antaŭ Italio,” respondis Eriko kun plena fido.

DUOBLA RIPOZO

A: “Hieraŭ nokte mi ĝuis duoblan ripozon.”

B: “Kiel do?”

A: “Mi sonĝis, ke mi estas dormanta.”



PLI KARA DOMO

Filino plendis al la patrino: “Panjo, kial ni ne loĝas en pli kara domo?”

La patrino respondis: “Estu pacienca. Ni baldaŭ loĝos en pli kara domo. La luiganto sciigis min, ke morgaŭ li altigos la lupagon.”

MEMORKAPABLO

Patrino: Iu sciencisto diris, ke la plej grava objekto de homodum la vivo estas forta memoro.”

Filino: “Kiu sciencisto diris?”

Patrino: “Mi ne povas rememori.”

MIA ONKLINO

“Berti ne volas edziniĝi al mi. Poste mi diris al ŝi, ke mi havas riĉan onklon.”

“Certe ŝi jam konsentis edziniĝi al vi?”

“Ne, ŝi nun estas mia onklino.”

La progreso de ĉinlingva informa traktado

LA mondo nun eniras en la informan socion, kies plej ĉefa karakterizaĵo estas per komputilo trakti informojn de lingvo, inkluzive de iliaj konservo, klasifikado, statistikado, retrovado, konvertado, transigo, regado kaj imitado, kun celo starigi modernan lingvan inform-sistemon por kiel eble plej bone utiligi skriban lingvon kaj kiel eble plej plene efikigi informojn de scioj en skriba lingvo.

La nivelo de aplikado de skriba lingvo rekte spegulas la disvolviĝon de unu nacio aŭ unu socio. Pro diversaj kaŭzoj Ĉinio postĝigas en aplikado de nova tekniko al lingvouzo kompare kun Japanio kaj la okcidentaj landoj. Jam pasis 11 jaroj, de kiam Ĉinio komencis esplori la ĉinlingvan inform-traktan sistemon en 1974. Dank' al la disvolviĝo de la komputila afero en Ĉinio, progresas la tekniko de ĉinlingva informa traktado.

Por praktiki la ĉinlingvan informan traktadon, oni devas posedi antaŭ ĉio la teknikon de ĉinlingva informa traktado. Jam en la sesdekaj jaroj la evoluantaj landoj komencis uzi komputilojn por trakti lingvajn informojn kaj tiu tekniko rapide populariĝis. Estas multe pli malfacile trakti ĉinlingvajn informojn ol la okcidentlingvajn. Ni prenu la anglan lingvon kiel ekzemplon. Ĝi havas 26 literojn kaj la nombro de la signoj por ĝiaj majusklaĵ kaj minusklaj literoj, ciferoj kaj interpunkcioj ne superas 128, kiuj povas esti esprimitaj per

sep binaraj ciferoj. Sed la afero estas tute alia por grandnombraj ĉinaj ideogramoj kun komplika strukturo. Por distingi ilin unu de alia necesas almenaŭ dek binaraj ciferoj, kio malfaciligas enmeton kaj konservon de ideogramoj.

Ekzistas ĝenerale du metodoj de enmeto, t.e., ideograma enmeto kaj koda enmeto. La ideograma enmeto bezonas grandan klavaron kaj ĉiu ideogramo okupas po unu klavon, kio malfaciligas la uzadon. La tendenco montras, ke la koda enmeto fariĝos la ĉefa metodo. En la lastaj jaroj ĉinaj fakuloj faris statistikon pri materialoj de pli ol 20 milionoj da ideogramoj kaj finplenumis la enketon pri uzado de ideogramoj. Sur la bazo de la statistiko, analizo kaj esploro pri la karakteroj de la ĉinaj ideogramoj oni ellaboris pli ol 400 projektojn de ideogramaj kodoj, el kiuj pli ol 40 estas praktikataj kaj ĉ. dek pli vaste aplikataj. Prof. Ĉjan Ŭejĉang, prezidanto de la Ĉinlingva Inform-trakta Societo de Ĉinio, ellaboris Ĉjan-kodon, kiu altiris la atenton de en- kaj eksterlandaj specialistoj. Konsiderante la ĉinan ortografian sistemon, prof. Ĉjan difinis en sia kodo ok fundamentajn strekojn kaj 163 elementojn. La kodo postulas, ke oni uzu aparaton kun 43 klavoj por norma eŭropa lingvo. La manipulado de tiu kodo estas facila, ke nespartulo, post nur unusemajna lernado, povas enmeti 45 ĉinajn ideogramojn ĉiuminute.

Oni povas dividi tiujn pli ol 400 projektojn en tri kategoriojn:

laŭforma kodo (kompilita laŭ formoj de ideogramoj: iliaj strekoj, radikoj kaj angulformoj), laŭsona kodo, laŭsona kaj laŭforma kodo. La projektoj de laŭforma kodo estas pli multaj. Nun ĉinaj fakuloj intencas ellabori normojn por taksu la laŭformajn kodojn kaj ekzameni kune kun uzantoj ĉiujn projektojn por elekti pli bonajn projektojn kaj apliki ilin en praktiko.

Malgraŭ tio, la metodo de ideograma enmeto kaj tiu de koda enmeto ne akordiĝas kun komputilo en rapideco. Por solvi tiun problemon, ĉinaj fakuloj esploras novan enmetan metodon. Lastatempe ili atingis sukcesojn en distingo de ĉinlingva fonetiko kaj aŭtomata distingo de ĉinaj ideogramoj.

Japanio estas lando, kiu uzas multegajn ĉinajn ideogramojn. En la sesdekaj jaroj japanoj jam komencis esplori informan traktadon de ĉinaj ideogramoj. En 1977 ili faris aparaton, kiu povas enmeti 6 000 ideogramojn ĉiuminute. Ĉinoj havas abundon da materialoj pri la reguloj kaj karakterizaĵoj de la ĉinaj ideogramoj kaj proprajn komprenon kaj konon pri ili. Tio estas favora al ĉinoj en ilia esplorado de aŭtomata distingo de ĉinaj ideogramoj per aparato. Kvankam la teoria studo de Ĉinio estas malproksima de la avangarda nivelo de la mondo, tamen ĝi rapide progresos, se Ĉinio havos certajn kondiĉojn por esplorado.

Laŭ nekompleta statistiko, Ĉinio havas ĉ. cent organizojn,

kiuj produktis pli ol 120 specojn de ĉinlingvaj inform-traktaj sistemoj kaj ekipaĵoj, kun certa produktopovo. Jam estas elfarita lasera komposta komputilo-sistemo por la ĉina lingvo, kies kunprema tekniko atingis la avangardan nivelon de la mondo. Jam naskiĝis grafika inform-trakta sistemo por ĉinaj ideogramoj. Ĉinio povas produkti kelkcent kompletojn da ĉinlingvaj fininstalajoj kaj presiloj en unu jaro. Palp-tipan klavaron oni jam produktas po-malgrande. Nun la mikrokomputiloj proponitaj de la ŝtato ĉiuj havas funkcion trakti ĉinajn ideogramojn. Por eviti ripetadan esploradon per granda kvanto da homfortoj kaj mono, la Ĉinlingva Inform-trakta Societo de Ĉinio kunvokis specialistojn por diskuti pri la normigado de tipoj de la ĉinlingvaj fininstalajoj. Ili difinis kvar tipojn, t. e. simpla, norma, intelekta kaj kontrastacia. Tio metas novan fundamenton por sistemigi, normigi kaj popularigi la esploradon kaj produktadon de ĉinlingva fininstalajo.

Kun la progreso de scienco kaj tekniko de komputiloj, la esplorado de la ĉinlingva informa trak-



Ĉinlingva informa traktado per ĉinlingva fininstalajo

tado transiros paŝopostpaŝe kaj ĉefe al tiu de naturlingva traktado. Ĉinaj fakuloj multe laboris por statistiko de lingvaĵoj, kompilado de grafikaĵoj kaj indeksoj, starigo de leksikono, kompreno kaj traktado de natura lingvo, maŝina tradukado, perkomputila helpa instruado, aŭtomata distingo de ĉinaj ideogramoj, fonetikaj

distingo kaj kombinado, kaj ilia laboro certgrade progresis. Ĉinio estas multnacieca lando. Traktado de la lingvoj de la naci-malplimulto estas konsistiga parto de la ĉinlingva informa traktado. Nun jam aperis inform-traktaj sistemoj por la lingvoj mongola, uĝura, kazaĥa, korea, tibeta, ĝuang-a kaj ji-a.

ANONCO

Sciencaj, teknikaj E-libroj, -gazetoj kaj -artikoloj ege dezirataj.

Reproduktoj kaj poŝtpagoj resendotaj al enlandaj donacantoj.

Ĉinaj eldonaĵoj esp. aŭ ali-lingvaj, bk, pm aŭ aliaj aferoj sendotaj al eksterlandaj donacantoj konforme al ilia postulo en egala valoro laŭ ĉina ŝanĝ-tarifo de fremdaj valutoj.

Donacantoj de reproduktoj bonvolu sendi unue liston de titoloj koncernaj.

Koran antaŭdankon. Adr.: Vicprofesoro Soliva, Department of Applied Mathematics, Dalian Institute of Technology, Dalian, China.

Kion rimarkigis niaj legantoj

Dank' al la subteno de niaj legantoj sukcese finiĝis elektado de la plej ŝatataj artikoloj kaj bildoj de nia revuo en 1984. Ĝis la unua tagdeko de aprilo, ni ricevis pli ol 500 enketilojn el 37 landoj. La nombro multe superis tiun en la lastaj jaroj. Jen la rezulto.

En 1984 en nia revuo aperis sume 239 artikoloj, kaj ĉiu el ili havis siajn ŝatantojn. Ĉiuj kovriloj, dorskovriloj, koloraj kaj nigraj-blankaj bild-serioj senescepte havis siajn aprobantojn. Tio montris, ke plaĉas al niaj legantoj malsamaj artikoloj kaj bildoj pro iliaj diversaj profesioj. Tio montris ankaŭ, ke dank' al la kuna penado de la legantoj kaj ni pli kaj pli perfektigis nia revuo ĉu enhave ĉu kvalite.

Rezulte, la 47 artikoloj pri Esperanto gajnis 1 529 aprobantojn. La 111 artikoloj pri la nuna Ĉinio, ĝia konstruado kaj popola vivo gajnis 3 460 aprobantojn. La 58 artikoloj pri la ĉinaj historio, geografio, kulturo kaj aliaj gajnis 3 297 aprobantojn. La 15 artikoloj pri internaciaj problemoj kaj amikeco gajnis 342 aprobantojn. La aliaj 8 artikoloj gajnis 95 aprobantojn. La 13 artikoloj sub la rubriko "Sude kaj Norde de la Granda Muro" en 1984, plej ŝatataj de niaj legantoj, gajnis 1 069 aprobantojn. La 11 artikoloj sub la nova rubriko "Por Via Sano" gajnis 832 aprobantojn kaj iliaj meznombro gajnitaj aprobantoj estis nur malpli multaj ol tiuj de la artikoloj pri la Granda Muro. Ankaŭ la rubriko "Enciklopedieto de Ĉinio" plaĉas al niaj legantoj. Ĝiaj 11 artikoloj gajnis 585 aprobantojn. El ĉiuj aperintaj artikoloj la plej multe laŭdataj estas "La Granda Muro", aprobata de 128 legantoj, "Memmasaĝo", ŝatata de 118 legantoj, kaj

"Bronzaj Ĉevaloj kaj Ĉaro Elterigitaj ĉe la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio", bonvena al 108 legantoj.

Rilate niajn bildojn, la kovriloj plej plaĉas al niaj legantoj. Ili gajnis sume 1 213 aprobantojn. La bild-serio sub la rubriko "Vidindaj Lokoj" gajnis 724 aprobantojn. La bild-serio "Sude kaj Norde de la Granda Muro" gajnis 721 aprobantojn. La foto "La Granda Muro" por la kovrilo de la unua n-ro estas alte taksata de 190 legantoj. La koloraj bildoj por la artikolo "Huanggūoŝu-akvofalo" de la n-ro 10 estas aprobitaj de 97 legantoj kaj la nigra-blanka bild-serio "Renkontiĝo de Ĉinaj kaj Japanaj Gejunuloj", kiu plaĉas al 31 legantoj, okupas la unuan lokon en la samspecaj bild-serioj. Ĝenerale, la kovriloj de nia revuo en 1984 rimarkinde pliboniĝis. Inter ili tiuj de la n-roj 1, 2, 4, 10, 12 trovis po pli ol 100 laŭdantojn.

Nia opinikontrolo montras, ke nia revuo ankoraŭ havas multajn mankojn en la enhavo. Ekz. nia raporto pri ekonomio devas pliboniĝi, nia raporto pri la popola vivo ne estas enhavoriĉa, la artikoloj pri internaciaj problemoj ne tiel bone verkitaj kaj la kvalito de la nigraj-blankaj bildoj kaj bildoj de dorskovriloj relative ne alta. En sia respondo al la demandaro niaj legantoj faris bonajn kritikojn kaj proponojn, pro kio ni kore dankas ilin.

Ni donacis la bild-kolekton "El Novaj Ĉinstilaj Pentraĵoj" al ĉiu, kiu respondis nian demandaron. Por perfektigi nian revuon, ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos en tia aktivado en la estonteco.

La Redakcio

LA ANTIKVA URBO NANKINO

de JANG MINGĜAŬ

Ekde tiu ĉi numero ni konigos la duan vojaĝ-linion al la partoprenantoj de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto. La linio trairas la antikvan urbon Nankino, Uŝji apud la lago Tajhu, Ŝanhajon, la plej grandan urbon de Ĉinio, kaj Suĝoŭ kaj Hangĝoŭ, konatajn kiel paradizo en Ĉinio.

— La Red.

Geamikoj, se vi vojaĝos en nian landon, bonvolu ĝui la ĉarman pejzaĝon de la antikva ubro Nankino.

La vidindaj lokoj de la urbo ĝenerale situas apud montoj kaj akvo.


La verda Ziĝin-monto alte staranta en la orienta parto de la urbo estas unu el ĝiaj famaj pitoreskejoj. Ĉe la suda piedo de la monto estas la maŭzoleo de Ĝu Ĵuanĝang, la unua imperiestro de Ming-dinastio, konstruita an-

taŭ 600 jaroj. Laŭ la maŭzolea vojo staras ŝtonplatoj kun gravuritaj vortoj laŭdantaj lian meriton. kvadrataj kioskoj kaj 12 paroj da antikvaj ŝtonaj statuoj de bestoj, soldatoj kaj korteganoj. Proksime de la maŭzoleo sin trovas la grandioza maŭzoleo de Sun Jatsen, granda ĉina revolucia pioniro, en ĉina kaj okcidenta stilo. Trairinte la maŭzolean vojjon de 480 metroj kaj poste 392 ŝtonajn ŝtupojn, oni povas atingi la memor-halon de d-ro Sun Jatsen. Starante antaŭ la memor-

halo, oni povas vidi la ĉirkaŭajn verdajn montojn, la grandan riveron Jangzi kaj la urbon en malproksimo. En la kvietaj memoralo kaj ĉerkoĉambro estas blankmarmoraj sida kaj kuŝa statuoj de d-ro Sun Jatsen. Tiu granda revoluciisto estas ĉiam respektata de la popolo, kaj la maŭzoleo ĉiutage akceptas multajn vizitantojn. La mondfama Ziĝinŝan-a Astronomia Observatorio sur la tria pinto de Ziĝin-monto estas centro de astronomia esplorado de Ĉinio. Tie estas multaj grandaj delikataj astronomiaj instrumentoj de la Orienta Han-dinastio (1-a — 3-a jc.) kaj ruino de fortreso konstruita de la kamparana armeo de la Tajping-a Ĉiela Regno en la mezo de la 19-a jarcento por rezisti kontraŭ la armeo de Ĉing-dinastio.

Nordokcidente de Ziĝin-monto ondas Ĉjiŝja-monto. Aŭtune ĝi estas vestita per ruĝaj acerfolioj. La templo Ĉjiŝja konstruita sur la monto en Suj-dinastio antaŭ 1 300 jaroj estas unu el la kvar grandaj temploj de Ĉinio. En la templo staras sarira ŝtona pagodo kun delikataj skulptaĵoj, kiu estas ĉefverko de la budhisma arto sude de Jangzi-rivero. Ĉe la montpiedo antikvuloj faris 394 niĉojn kun pli ol 500 budhosta-

En Ŝjihŭa-ĝardeno, ruino de la Reĝpalaco de la Tajping-a Ĉiela Regno
Foto de ĜANG ĜEN





Turistoj aĉetas diverskolorajn ŝtonetojn de Juhŭataj.

Foto de ĈEN ĜE

tuoj. Kvankam ĉi tiuj estas eroziitaj, tamen ankoraŭ videblas ilia eminenta skulptarto. Ĉe la orienta piedo de Ziĝin-monto estas la Sentraba Halo de Linggutemplo, konstruita en 1381. La gustoplena halo estis konstruita tute el brikoj sen trabo kaj kolono, eĉ sen najlo. Tio montris la saĝon de antikvaj ĉinaj arkitektoj. Kelkcent metrojn norde de la halo estas Linggutemplo kun alta ŝtona sammoma pagodo. Starante sur la pagodo, oni sentas sin kvazaŭ en la firmamento.

Nankino havas ne nur belajn montojn, sed ankaŭ belajn riverojn. La larĝa Jangzi-rivero kvazaŭ giganta drako kuŝas nordokcidente de la urbo. La Nankina Pontego super Jangzi-rivero, kun longeco de 6 772 metroj, estas du-etaĝa ponto por fervojo kaj aŭtovojo. Ĝi kvazaŭ ĉielarko interligas la nordan kaj sudan bordojn de la rivero. Promenante sur la pontego, oni povas aŭdi

plaŭdadon de la akvo sub la piedoj kaj vidi la riveron kaj la ĉielon en unu tuto en malproksimo. Okcidente de la urbo estas Ĉinĥŭaj-rivero, per kiu oni siatempe transportis grenon al la imperiestro. Apud ĝia bordo estas la Templo de Konfuceo, garnita per delikate gravurita balustrado kaj provizita per luksaj plezurŝipoj. De la antikveco ĝi estas la plej movoplena loko en la urbo kaj nun servas kiel ripozejo de la laboranta popolo. En la Lanterna Festo la loko abundas je diversaj koloraj lanternoj interesantaj turistojn. En la urbo oni konstruis Ŝjŭan'u-lagon, Moĉoŭ-lagon kaj Bajluĝoŭ-ĝardenon en grandajn parkojn. Ĉiusezone ili altiras al si multajn vizitantojn per variaj pejzaĝoj.

Krome en Nankino estas ankaŭ jenaj vidindaj lokoj: Juhŭataj, tombejo de revoluciaj martiroj, en sudo; la Tambura Turo apud la urbocentra placo; la Reĝpalaco de la Tajping-a Ĉiela Regno kaj Mejĵŭan Ŝincun, restaĵo de la delegacio de la Komunisto Partio de Ĉinio en la kvardekaj jaroj, en oriento; Ĉingljangŝan-parko en okcidento kaj la 37-etaĝa hotelo Ĝinling kun rotacia restoracio sur movoplena strato. Ĉiuj tiuj lokoj impresas vin per originala konstru-arto kaj densa loka koloro kaj helpas vin pli bone koni la antikvan Ĉinion kaj la antikvan Nankinon.

Nankino estas unu el la famaj antikvaj ĉefurboj de Ĉinio. Frue en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj periodo de Militantaj Regnoj (8-a — 3-a jc. a. K.) la reĝo Fuĉaj de U-regno konstruigis urbomuregon sur la malantaŭa monto de la palaco Ĉaŭtjan en la okcidenta parto de la urbo. Ĉar postaj dinastioj iom translokis sian ĉefurbon, estas tre malfacile trovi la ruĥon de la

antikva urbo. Tamen oni povas klare vidi la alte starantan Ŝtonan Urbon konstruigitan de Sun Ĉjŭan, la reĝo de la Orienta U-regno en la komenco de la tria jarcento.

Surtroniĝinte, Sun Ĉjŭan prenis Nankinon kiel sian ĉefurbon. Poste sep dinastioj faris la samon. El la ĉefurboj tiu de Mingdinastio (1368-1644) estas la plej grandioza. La Ming-dinastia imperiestro Ĝu Jŭanĝang konstruigis tie urbomuregon altan kiel 5-etaĝa domo, kun longeco de 33.4 km. Ĝi estis siatempe la plej longa en la mondo. Sur ĝia supro du militĉevaloj povas paralele kuri. Ĝi havas 13 pordegojn, el kiuj la suda pordego Ĝonghŭa restas sendifekta. La pordego kovranta areon de 15 000 kvadrataj metroj konsistas el tri fortresoj kun kvar arkaj pordoj kaj 27 fuortoj, kiuj povas enteni milojn da soldatoj.

Nun Nankino jam transformiĝis el antikva urbo en prosperan industrian urbon. Se vi havas intereson, vizitu iujn el ĝiaj grandaj fabrikoj kaj manĝejoj ĉe stratoj. La nankina manĝaĵo havas guston sudan kaj nordan. Preĉipe ĉe la Templo de Konfuceo estas pli da manĝaĵ-specoj kun pli bona gusto. Ĉe la forlaso de la urbo aĉetu diverskolorajn ŝtonetojn de Juhŭataj kiel memoraĵon. Tiuj naturaj ŝtonetoj de diversaj formoj estas propraj al Nankino kaj trembrilas en akvo.


Unu vido taŭgas pli ol dek aŭdoj. Per la mallonga artikolo estas malfacile detale konigi al vi la longan historion, brilan kulturon kaj ĉarmajn pejzaĝojn de la urbo. Se vi promenas sur ĝiaj maŭzoleaj vojoj kaj rigardas ĝiajn historiajn restaĵojn, vi povas vidi ĝiajn antikvecon kaj grandiozecon. Bonvenon al vi, geamikoj!



Močoŭ-lago en printempo Foto de LIŪ ĆJIMEJ






Nankino en nokto Foto de ĜANG ĜEN



La maŭzoleo de Sun Jatsen
Foto de JAN ĜIN

La maŭzoleo de Gu Ĵianĝang — Foto de LIŬ ĈJIMEJ





Oni ĝuas umejlorojn.
Foto de ŬANG GŬANGLIN

La nova hotelo Ĝinling

Foto de JEN ĜENBEJ

La templo Ĉjiŝja kaŝita en verdaĵo

Foto de JEN ĜENBEJ



La baletto "Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj"

Fotoj de **ŜEN ĈEN**
Kaj **HAI FENG**



Dancado

Papiliĝo

En legoĉambro



Malrapide leviĝis la kurteno. Eksonis melodio de violonoj kaj ekdancis paro da buntaj papilioj simbolantaj sinceran amon. La bela muziko, la graciaj dancopaŝoj kaj la pompa dekoracio prezentis pentrindajn bildojn kaj kondukis la rigardantojn en tre belan malnovan amsentan rakonton.

“Ljang Ŝanbo kaj Ĝu Jingtaj” estas ĉina antikva romantika popolrakonto. Ĝiaj herooj Ĝu Jingtaj kaj Ljang Ŝanbo estas reprezentantoj de la gejunuloj de la feŭda socio, kiuj kontraŭbatalis la feŭdan etikon kaj sopiris al libereco, amo kaj feliĉa vivo. Ĝu Jingtaj en viraj vestoj lernis kune kun Ljang Ŝanbo tri jarojn kaj amis lin profunde. Antaŭ ol reveni hejmen, Ĝu Jingtaj promesis fianĉinigi sian “fratinon” al Ljang Ŝanbo. Ĝuste kiam Ĝu Jingtaj atendis Ljang Ŝanbo, ŝia patro devigis ŝin fianĉiniĝi al junulo Ma, sed ŝi malobeis. Laŭ la invito Ljang Ŝanbo venis al la hejmo de Ĝu Jingtaj. Li tre miris kaj ĝojis, ke Ĝu Jingtaj fakte estis knabino. Post kiam li informiĝis, ke ŝia patro jam promesis fianĉinigi ŝin al junulo Ma, li ege malĝojis, malsaniĝis kaj baldaŭ mortis. Tio forte ŝiris la koron de Ĝu Jingtaj. Ŝi vizitis lian tombon. La tombo subite krevis kaj Ĝu Jingtaj sin ĵetis en ĝin. Kiam la fendo estis malrapide fermiĝanta, el ĝi elflugis paro da buntaj papilioj kaj ekdancis inter floroj. . .

La baleto, verkita kaj prezentita de la Kantadanca Trupo de Ljaŭning-provinco, estis nova provo de ĉinaj dancistoj por adapti al baleto la ĉinan nacian teatraĵon. La baleto atingis bonan sukceson kaj ricevis laŭdon de rigardantoj.

Sceno el la akto “Papili-transformiĝo”



Lernado



lom pri la ĉinaj papertranĉaĵoj



Pavo

PAPERTRANĈAĴO estas bela popola artaĵo, kiu aperis antaŭ ĉ. 1 500 jaroj en Ĉinio.

La plej fruaj papertranĉaĵoj, kiujn oni eltrovis en Ĉinio, estis faritaj en la Nordaj Dinastioj (439—534 p. K.). En Ŝingĝang oni elterigis kvin papertranĉaĵojn de la Nordaj Dinastioj, kiuj estis faritaj el pluroble faldita papero. Sur unu el ili estas 8 paroj da simioj, ĉiu staras dorse kontraŭ alia kaj ĉiu simio rigardas al sia kunulo. La simioj, vicigitaj en segildenta cirklo, ŝajnas, sin amuzas ludante. La kvin papertranĉaĵoj estas pli-malpli valoraj por esplori pri la arto de ĉinaj antikvaj papertranĉaĵoj.

La papertranĉa arto floris en Tang-dinastio (618-907 p. K.). Tiam oni algluis eltonditan bil-


don el orita lameno aŭ arĝentita lameno al lakaĵo aŭ dorsflanko de kupra spegulo. En Song-dinastio (960—1279 p. K.) oni uzis papertranĉaĵojn kiel ornamaĵojn sur donaco aŭ fenestro kaj bildojn sur porcelanaĵoj, florzvazoj kaj aliaj metiartaĵoj. En Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.) la papertranĉa arto jam penetris en ĉiutagan vivon kaj papertranĉaĵo estis uzata kiel modelo por brodi ŝuon, kapkusenon, tablotukon kaj aliajn.

Nun ĝi jam prosperas en la vasta teritorio de Ĉinio. Ĝi en diversaj stiloj beligas la vivon de la popolo. La ĉarmaj floroj, vivecaj bestoj, antikvaj belulinoj kun altaj hartuberoj kaj larĝaj manikoj kaj meritoplenaj herooj en diversa grandeco senescepte im-

presas bele.

La ĉinaj papertranĉaĵoj estas permane tonditaj aŭ gravuritaj ĝenerale en serioj. Ĉiu serio konsistas el du, kvar aŭ dudek pecoj. Ĉiu serio havas belan koverton. La ĉinaj papertranĉaĵoj ĝenerale estas faritaj el ĉina ŝĵuan-papero aŭ helflava papero el bambuo kaj kolorigitaj poste. Troviĝas kvar specoj de papertranĉaĵoj: nigra-blanka, kolora, kolorpentrita kaj plurkolora, el tiuj la plej popularaj estas nigra-blankaj. La ĉinaj papertranĉaĵoj estas karakterizitaj per sia racia aranĝo, klara kontrasto kaj diversaj tondmanieroj. Dank' al tio, la artaĵoj elspiras freŝecon kaj fortecon. La plurkoloraj papertranĉaĵoj distingiĝas per harmoniaj kaj elegantaj koloroj, tiel ke la eltonditaj flo-

Tutjare disvolviĝanta florplanto



Papilio sur floro



Gruo kaj pino simbolantaj longvivecon






Fenikso



Floroj



Krizantemo

roj, birdoj, pejzaĝoj kaj vidindejoj allogas per sia ĉarmeco. Dank' al siaj lertaj esprimmanieroj la papertranĉaĵoj prezentas versimilajn bildojn. Ekz., la krizantemo havas multajn petalojn, sed la eltondita krizantemo nur kelke da petaloj, tamen ĝi estas tiel viveca, ĉar artistoj kaptis la esencajn trajtojn de la objekto kaj ree prezentas ĝin sur papertranĉaĵo per skiza maniero. Malsamstilaj estas la norda kaj suda papertranĉaj artoj. La nordaj artaĵoj estas simplaj kaj krudaj, dum la sudaj estas delikataj kaj elegantaj.



En la vastaj kamparoj de Ĉinio, por celebri la Printempan Feston ĉiu familio ornamas la domon per versparoj, novjaraj pentraĵoj kaj ankaŭ porfenestraj kaj

porpendaj papertranĉaĵoj. Ĉiu serio de porpendaj papertranĉaĵoj konsistas el kvin pecoj, sur kiuj estas eltonditaj benaj vortoj, kiel "paco en la tuta jaro", "riĉa rikolto" kaj aliaj, kaj kiujn oni algluas al la trabo kaj lintelo de la pordo. Flirtante en vento, ĝi donas pli da festa atmosfero al la Printempa Festo. Ankaŭ en la geedziĝa tago la ĉinaj kamparanoj ŝatas ornamo la ĉambrojn per papertranĉaĵoj "nuptaj bildoj". Tio estas eltonditaj ĉina ideografiaĵo "Duobla Ĝojo" kaj paroj da pigoj, papilioj kaj ambirdoj. Oni algluas la papertranĉaĵojn al la ĉambro de novaj geedzoj, aŭ metas ilin sur iliajn ĉiutagajn necesajojn kaj meblojn, por pliiĝojan atmosferon kaj simboligi la amon de la geedzoj.

La papertranĉa arto estas populara ankaŭ en la regionoj de la nacimalplimulto de Ĉinio. La dung-naciecaj virinoj ŝatas brodi, prenante papertranĉaĵon kiel modelon, diversajn belajn bildojn sur tukoj, per kiuj ili portas siajn infanojn. La mjaŭ-aj knabinoj ŝatas brodi diversajn florojn sur la manikoj de vesto, prenante papertranĉaĵon kiel modelon. Iuj nacimalplimulto ŝatas brodi florojn sur antaŭtuko en la sama maniero.

Ĉinaj papertranĉaĵoj ĝuas altan renomon en la internacia merkato, dank' al siaj altnivela arto, malmulta kosto kaj facila kunportebleco. La turistoj vizitantaj Ĉinion kutime aĉetas seriojn da papertranĉaĵoj por donaci ilin al siaj parencoj kaj amikoj.

La plej fruaj papertranĉaĵoj de Ĉinio, kiuj surhavas figurojn de 16 simioj kaj 12 ĉevaloj, estas eltrovitaj en Ŝinĝjang.



Birdo kaj floroj





De maldekstre supre: Li Ning, Lang Ping, Ŝju Hajfeng, Ĝu Ĝjanhŭa kaj Lŭan Ĝjuĝe;
de maldekstre sube: Ĝang Ĵongfang, U Ŝude, Li Lingŭej, Jan Hong kaj U Ŝjaŭŝjŭan.
Fotoj de SEN ĈEN

DEK PLEJ ELSTARAJ SPORTISTOJ DE ĈINIO


de LIN MIN

“Mi tre ekscitiĝis, kiam mi estis elektita kiel plej elstara sportisto post mia 14-jara flugpilka vivo,” diris Ĝang Ĵongfang, kiu antaŭ nelonge ekŝiĝis je sia ofico de estrino de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo, post kiam pli ol 1 400 000 sportaj amatoroj elektis ŝin kiel unu el la plej elstaraj sportistoj de Ĉinio por 1984.

La aktivado por elekti dek plej elstarajn sportistojn, iniciatita de la redakcioj de la gazetoj “Sporto” kaj “Nova Sporto” kaj aliaj ĵurnalismaj organizoj, okazas en Ĉinio unu fojon ĉiujare ekde 1979. En la aktivado ĉinaj sportaj amatoroj libere elektas per balotiloj dek plej elstarajn sportistojn de la jaro. La aktivado ricevis ĉiam pli varman subtenon de la publiko. En 1979 estis 90 000 partoprenantoj, kaj ĉi-jare la nombro kreskis al pli ol 1 600 000.

La unua plej elstara sportisto de 1984 estas gimnasto Li Ning, kiu gajnis tri orajn, du arĝentajn kaj unu kupran medalojn en la 23-aj Olimpikoj en Los-Anĝeleso. Li, laŭdata de la gimnastamantoj kiel “princo de gimnastiko”, aĝas nur 21 jarojn. Ĝis nun li ricevis preskaŭ 50 orajn medalojn en grandaj enlandaj kaj internaciaj konkursoj. Al duringaĵo kaj surparalelaĵo kreitaj de li la Internacia Gimnastika Federacio donis lian nomon. Nun li famiĝis tra Ĉinio. Ĝuste dum la aktivado la Studio de Ĝuangŝji faris la televidan filmon “La Princo de Gimnastiko” por priskribi tiun Ĝuangŝji-anon, ĉinan gimnastikan stelon.

La dua elektito estas lerta flugpilkestino Lang Ping, kiu ĵus fariĝis estrino de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo. Tiu pekina knabino havas 25 jarojn. Ŝi faris grandan kontribuon al sia teamo, ke ĝi




gajnis la ĉampionecon sinsekve en la Tria Virina Mondpokala Flugpilka Konkurso, la Naŭa Monda Virina Flugpilka Ĉampionea Konkurso kaj la 23-aj Olimpikoj. Ŝi transprenis la estrecon de Ĝang Ĵongfang ĉe ties glora retirigo. Ŝi estas profunde amata de ĉinaj sportaj amatoroj kaj kvinajoje elektita kiel unu el la plej elstaraj sportistoj.

Tiu nova estrino ŝarĝita per peza tasko diris: "Se mi ankoraŭ ludos en flugpilkejo, mi plenforte strebos por nova ĉampioneco."

Inter la plej elstaraj sportistoj, kompreneble, enviciĝas pafisto Ŝju Hajfeng, kiu gajnis por Ĉinio la unuan oran medalon en la 23-aj Olimpikoj. Kiel iama komizo de koopera vendejo en Anhuj-provinco, li gajnis honoron por la ĉina popolo, kiu neniam forgesos lian meriton.

Ĝu Ĝjanhŭa estas la plej multesperiga nova altsaltisto de Ĉinio. En junio 1984 en FR Germanio li kreis mondan rekordon de 2.39 metroj. En la 23-aj Olimpikoj li gajnis neatendite, nur kupran medalon. Tamen ĝis nun ĝi estas la unua kupra medalo de altosalto gajnita de li en la 23-aj Olimpikoj por Ĉinio kaj ankaŭ la ununura medalo de Ĉinio en atletiko. La popolo estas justa. Ĝi bedaŭris por li, sed ne deflankiĝis de sia objektiva juĝo pri li. Lin aprobis 1 470 000 balotantoj. Tiu



21-jara alta kaj maldika sportisto estas triajoje honorita per la titolo.

La nunaj dek plej elstaraj sportistoj okupiĝas respektive pri ok sportbranĉoj. Inter ili troviĝas skermistino Lŭan ĜjuĜje. Kun firma volo kaj per eminenta arto ŝi gajnis la oran medalon de virina rapirado en la 23-aj Olimpikoj kaj fariĝis la unua aziano enskribita en la skerman historion de la Olimpikoj post 1896. Post kiam oni elektis tiun 27-jaran skermistinon kiel unu el la plej elstaraj sportistoj, ŝi diris en sia artikolo: "La sukceso kaj honoro jam fariĝis pasintaĵo. Mi strebos al la venontaj Olimpikoj."

Inter la elektitaj sportistoj estas alia sportisto, kiu kiel Lang Ping kvinajoje ricevis la honoron. Li estas eminenta halterlevisto U Ŝude, 25 jarojn aĝa. En la 23-aj Olimpikoj li gajnis la oran medalon de halterlevo je 56-kilogramo pezkategorio.

En intensaj konkursoj de la 23-aj Olimpikoj iu juna ĉina knabino gajnis oran kaj kupran medalon. Ŝi estas lerta pafistino U Ŝjaŭŝjŭan el la sudorienta marborda provinco Ĝeĝjang. Ŝi, aprobita de pli ol 900 000 balotantoj, unuafoje ricevis tian honoron.

En la aktivado estis honoritaj ne nur tiuj, kiuj gajnis olimpikajn medalojn. Kiam oni respektis la sukcesintojn en la Olimpikoj, oni kompreneble ne forgesis tiujn, kiuj, kvankam ili ne partoprenis en la Olimpikoj, atingis brilajn sukcesojn en aliaj konkursoj. Tiaj estas knabinoj Li Lingŭej kaj Jan Hong. Ili ne havis la okazon montri sian ludarton en la Olimpikoj, tamen per siaj admirindaj sukcesoj trovis ŝaton de balotantoj.


Volanistino Li Lingŭej akiris grandan renomon en la lastaj jaroj en la internaciaj volanistaj rondoj. Ŝi gajnis la ĉampionecon en la Unua Joneks-pokala Volana Konkurso en 1982. Ŝi gajnis la unuan lokon sinsekve en la Tria Mondpokala Volana Konkurso, la Internacia Rondira Grandpremia Konkurso kaj la Ĉina Sport-kunveno en 1983. Ŝi gajnis la ĉampionecon ankaŭ en pluraj altnivelaj konkursoj, kiaj la Tut-Anglia Volana Ĉampionea Konkurso kaj aliaj. Precipe, estante la unua ĉefludistino de la ĉina teamo, ŝi multe kontribuis al ĝi, ke ĝi unuafoje gajnis Uberpokalon en la Granda Uber-pokala Konkurso, kiu estas rigardata kiel la plej altnivela monda volanado. Sportaj amatoroj per aprobaj balotiloj montris respekton al ŝi.

Jan Hong estas nova marŝistino de Ĉinio. En la Tria Mondpokala Marŝa Konkurso okazinta en

Norvegio en 1983, ŝi la unua atingis la cellokon, sed ŝia marŝado restis vana pro ŝia malobservo de la regularo. En la internaciaj konkursoj okazintaj en Norvegio kaj Danlando ŝi rompis la mondrekordojn de virinaj 5 000-metra kaj 10 000-metra marŝadoj. Ŝi, 20-jara, estas la plej juna elektito.

La nuna aktivado estas pli grandskala ol la antaŭaj kvin kaj partoprenata de homoj de diversaj soci-tavoloj en diversaj lokoj. En la aktivado gejunuloj de lernejoj kaj fabrikoj varme diskutis por prezenti kontentigan liston. Ankaŭ multaj maljunaj gepatroj vigle konsiliĝis kun siaj gefiloj pri la balotado. Ke junaj lernantinoj kaj laborantinoj montris grandan intereson por la aktivado kaj la partoprenantoj estis senprecedence multaj, tio vekis grandan atenton de la publiko.

Oni opinias, ke unu el la kaŭzoj, ke la aktivado povis veki respondon de la publiko, kuŝas en tio, ke 1984 estis jaro, en kiu Ĉinio havis riĉan rikolton en sporto. En tiu jaro ĉinaj sportistoj gajnis 36 mondĉampionecojn, 17-foje rompis kaj superis mondrekordojn kaj atingis grandajn sukcesojn en la 23-aj Olimpikoj. Ĝuste tiuj sukcesoj havigis al la popolo fidon kaj pli grandajn interesojn kaj fervoron por sporto.



NOVAJ ŜANGĜOJ EN ĈINAJ KAMPARAJ FAMILIOJ

de ĜANG BAJŜUN

VIZITANTE kelkajn vilaĝojn de la regiono de Ŭejhe-ebenaĵo en Ŝenŝji-provinco antaŭ nelonge, mi rimarkis novajn ŝanĝiĝojn en la kamparaj familioj post enkonduko de la laŭkontrakta produkta sistemo, resumeblajn en jenaj dek punktoj:

1. Iom malfortiĝis la sendependiĝa volo de la junuloj. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, en la ĉina kamparo ekzistis stranga fenomeno pro la malalta nivelo de la produktaj fortoj kaj egalismo de la distribuado, nome, la familioj kun malmultaj labormanoj vivis relative facile, dum familioj kun multaj labormanoj relative malfacile. Sekve de tio multaj junuloj sia-

tempe ekhavis sendependiĝan volon, kiu manifestiĝis ĉefe en tio, ke la junuloj volis, post la geedziĝo, vivi sendepende, sed ne plu en la tri-generacia aŭ kvar-generacia familio. Post enkonduko de la nomita sistemo, la egalismo estis elradikigita kaj la familioj kun multaj laborfortoj havas pli da eblecoj por sin okupi pri kromproduktado, pli da metodoj por multigi la enspezon kaj fariĝis pli riĉaj kompare kun la familioj kun malmultaj laborfortoj. Tiu ŝanĝiĝo certgrade reduktis la sendependiĝan volon de la junuloj. Tio konkrete manifestiĝis per multiĝo de la tri-generaciaj kaj kvar-generaciaj familioj kaj malmultiĝo de la du-generaciaj familioj.

2. Fondiĝas novaj rilatoj inter la patro kaj filoj. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, en la ĉinaj kamparaj familioj ĝenerale estis la patro, kiu regis la tutan familion, precipe koncerne al la rilato inter la patro kaj la filoj, ĝenerale estis la patro, kiu rajtis decidi ĉion. La kaŭzo de tio kuŝas ne nur en la patriarkismo, la ĉina tradicia rilato inter la patro kaj filoj, sed ankaŭ en la egalisma distribuado en la produktaj rilatoj de tiama kamparo. Post la enkonduko de la nova produkta sistemo, oni rimarkis, ke en la kamparaj familioj pli kaj pli multaj junuloj administras la familiajn aferojn kaj nemalmultaj patroj volonte cedis la rajton al sia filo. Tio montris, ke post la enkonduko de la laŭkontrakta produkta sistemo la talento kaj kapablo de la junuloj disvolviĝis tiel plene, ke la patroj sentis necese meti siajn idojn en la direktan pozicion. Tio montras, ke nova rilato inter la patro kaj filoj fondiĝas.

3. Nova koncepto pri geedziĝo estas akceptita de pli kaj pli multaj gepatroj. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, la gepatroj en la kamparo havis ĝenerale du opiniojn pri la geedziĝo de siaj gefiloj: postuli fianĉdonacojn okaze de la edziniĝo de la filinoj, devige edzigi la filojn. Tia sinteno de la gepatroj koncernis ne nur la influon de la malnovaj kutimoj kaj moroj, sed ankaŭ la malaltan nivelon de la vivo. Post la instalo de la laŭkontrakta produkta siste-

Gojo de kamparana familio





Fotografo-amatoroj en kamparo

mo, multe altiĝis la nivelo de la vivo de la kamparanoj kaj pro la ĝusta propagando pri la nova leĝo de geedziĝo dum la lastaj jaroj pli kaj pli malgrandiĝis la malnova koncepto pri geedziĝo kaj multaj gepatroj pli kaj pli konsentis pri la leĝo de "geedziĝo de memdecido" kaj "amo en liberiĝo". Tial en la lastaj jaroj, kvankam okazis ankaŭ devigitaj geedziĝoj en la kamparo, tamen plioftiĝas liberaj geedziĝoj pro amo kaj tiu tendenco plue evoluos.

4. Multiĝis la nombro de la virinoj, kiuj laboras ĉefe en la hejmo. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, kiel viroj multaj virinoj frekven-

tis la kampojn pro la malalta produktiveco kaj egalismo en distribuado. Nun, kvankam ankoraŭ aperas virinoj surkampe, kiam tie estas multaj laboroj, tamen altempe, multaj virinoj, precipe la edzinoj, laboras ĉefe en la hejmo. En iu senco, tio restaŭris kaj evoluigis la tradiciajn virtojn, solidarecon, mildecon kaj bonkorecon de la ĉinaj virinoj.

5. Evoluis la bona tradicio esti mi la maljunulojn kaj helpi la infanojn. Tio estas unu el la bonaj tradicioj de la ĉina nacio. Sed tiu tradicio estis iam detruita, kaj eĉ antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, ĝi ankoraŭ ne restariĝis en la vasta ĉina kamparo. Post la starigo de la

nova produkta sistemo, sekve de la altiĝo de la nivelo de la materia vivo de la popoloj, pli kaj pli nobliĝis la spirito de la popoloj kaj la bona tradicio havas novan evoluon.

6. La solidareco de la familianoj rimarkinde plifortiĝis. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, en la ĉina kamparo elstaris konfliktoj inter bopatrino kaj bofilinoj kaj inter bofratinoj kaj ofte okazis kvereloj kaj interbatoj inter ili. La produkta bezono forte unuigis la familianojn kaj mildigis la tradician konflikton inter la familianoj. La solidareco de la familianoj rimarkinde plifortiĝis kaj maloftiĝis kvereloj kaj interbatoj.



Kamparaj knabinoj en novaj vestoj

7. La najbaroj vivas pli harmonie ol antaŭe. Antaŭ la praktiko de la nova produkta sistemo, pro la mankoj en la distribua sistemo en la ĉina kamparo, multe laboris tiuj kiuj estis laboremaj, sed kritikis la maldiligentajn tiujn kiuj multe laboris. Ne bonaj estis la rilatoj inter individuoj kaj inter familioj. Nuntempe, la malĝustaĵoj en la distribua sistemo estas forigitaj. La rilatoj inter individuoj kaj inter najbaroj rimarkinde pliboniĝis. En la kamparo, estas ne maloftaĵo, ke familio havanta malfacilojn ricevas helpojn el diversaj flankoj.

8. Malmultiĝis homoj, kiuj opinias, ke pli da filoj signifas pli da feliĉo, sed pli-malpli multiĝis homoj, kiuj preferas filon al filino. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, en la kamparo furoris la penso "pli da filoj signifas pli da feliĉo," pro la malalta produktiveco,

la bezono de multaj labormanoj kaj la influo de feŭdaj moroj. Post la praktiko de la nomita sistemo, pro la altiĝo de la produktiveco, rimarkinda malaltiĝo de la bezono de labormanoj kaj efiko de la propagando pri naskolimigo, pli kaj pli malmultiĝis la homoj, kiuj opiniis: "pli da filoj

(Daŭrigo de p. 12)

plej antikva el la ĉinaj vajraj pagodoj kaj ĝiaj kvin pagodoj estas kvadrataj kun plurobla tegmentrandoj. Ankaŭ la vajra pagodo en la templo Bijun sur Ŝjangŝanmonto de Pekino kaj tiu en Huhhot en la Interna Mongolio estas de tiu speco.

Ankaŭ multaj pagodaroj okupas gravan lokon en la pagoda arkitekturo de Ĉinio. La pagodaro en la templo Lingjan en Ĉangĉing-gubernio de Ŝanŝi-provinco kaj tiu okcidente de la templo Ŝaŭlin en Songŝan-gubernio de

signifas pli da feliĉo," sed pro la elstaraj roloj de junuloj en la laŭkontrakta produktado kaj influo de la tradicia moro, plimultiĝis homoj, kiuj preferas filon al filino.

9. Pliriĉiĝis la kultura vivo. Antaŭ la praktiko de la laŭkontrakta produkta sistemo, pro la malalta produktiveco, oni tuttage sin okupis pri la kampa laboro kaj la kultura vivo estis mizera. Post la starigo de la laŭkontrakta produkta sistemo, sekve de la altiĝo de la produktiveco kaj longiĝo de la postkamplabora tempo, la kultura vivo riĉiĝis. Tio manifestiĝis en la multiĝo de vizitantoj al kinejoj kaj teatroj, rigardantoj de televido kaj abonantoj de ĵurnaloj kaj revuoj.

10. Moderniĝis tagon post tago mebloj kaj aliaj bezonaĵoj en la kamparanaj loĝejoj. Antaŭe la kamparanoj vivis malfacile kaj ĝenerale tre simple ekipitaj estis iliaj loĝejoj. Nun ili donas pli kaj pli da atento al ilia modernigo surbaze de senĉesa altiĝo de la materia vivnivelo, tio manifestiĝas ĉefe en kresko de la vendokvanto de magnetofonoj, lavmaŝinoj, televidiloj, fridujoj ktp. en la kamparo.

Henan-provinco estas tomboj de diversdinastiaj bonzoj. La pagodaro en Ĉingtongŝja de Ningŝja estas des pli majesta. Ĝi konsistas el 108 pagodoj en 12 vicoj en formo de triangulo aranĝita laŭ la monto-deklivo. Tiuj pagodoj bonorde vicigitaj havas saman formon kaj rigardas al la Flava Rivero kio prezentas belan bildon.

La multnombraj pagodoj de Ĉinio estas ĝiaj raraj historiaj restaĵoj kaj havas gravan valoron por studi ĝiajn kulturon arkitekturon kaj arkeologion.

AL LA KVERKO


de ŜU TING

*Se vin mi amas,
mi certe ne surgrimpos la plej altan branĉon vian,
kiel la trumpetfloro*, por parado;
se vin mi amas,
mi ne imitos birdon am-pasian
kantante monotone al la verdo per kverado;
mi ankaŭ ne konsolos vin per freŝec-dono,
kiel fontfluo dum ĉiu sezono;
mi ankaŭ ne nur estos kruta pint' de monto
por ke pliigu via alto kaj impono.
Eĉ ne sunlumo,
eĉ ne printempa pluvo . . .
Ne, ĉio tio ne sufiĉas por plenumo!
Mi devas esti arbo, kapokarb' staranta
proksime al vi, flank' ĉe flanko.
Miaj radikoj firme tenos sin en tero;
miaj folioj ludos alte en aero.
Se vento venos,
salute ni nin interbenos;
tamen neniu*

*la vortojn niajn ekkomprenos.
Viaj fera trunko, bronzaĵ branĉoj
similas ja al glavoj kaj rapiroj,
kaj ankaŭ lancoj;
kaj miaj grandaj ruĝaj floroj
similos al pezaj suspiroj,
kaj ankaŭ torĉ' de gloro.
Dividos mi kun vi frostecon, ŝtormon, tondron;
kaj ĝuos kun vi ĉielarkon, vesperruĝan mondon.
Ni ŝajne ĉiam disigitaj,
sed dum la vivo kunligitaj.
Ja tia estas granda amo,
fidelo firma kun proklamo:
Mi amas ne nur vian korpon de giganto
sed ankaŭ vian pozicion kaj la teron sub la
plandoj.*

* Trumpetfloro = bignonio (*Bignonia chinensis*),
volvtiga planto kun ruĝaj aŭ flavaj floroj.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Lhasa
2. Ŭejhe-ebenaĵo
3. Ŝanhajo
4. Junnan-provinco
5. Kantono
6. Nankino
7. Uŝji
8. Suĝoŭ
9. Hangĝoŭ
10. Anĵang
11. Nantong
12. Guĵlin
13. Ĉangŝa
14. Uhan
15. Ĉongĉing
16. Ŝĵian
17. Langĝoŭ

REFORMO DE LA SCIENC-TEKNIKA ADMINISTRA SISTEMO

En la lasta tagdeko de marto Ĉinio decidis reformi la scienc-teknikan administran sistemon. Tio estas grava strategia decido por pluapase akceli la reformon de la ekonomia strukturo kaj solvi la problemon pri la tuto en la modernigo.

La ĉina scienc-teknika administra sistemo formiĝis en la specialaj historiaj kondiĉoj. Ĝi montris sian superecon, per kiu oni koncentris siajn fortojn por esplori gravajn scienc-teknikajn temojn. Tamen el ĝi rezultis serioza apartiĝo de la scienc-tekniko kaj la produktado, tiel ke la scienc-teknika esplorado ne konformiĝis al la bezono de produktado. Nun ĝi fariĝis pli kaj pli ne konforma al la postuloj de la

moderniga konstruado, kiu dependas de la sciencoj kaj teknikoj.

La ĉefaj enhavoj de la reformo estas: reformi la sistemon pri mon-asigno, ekspluati teknikan merkaton, forigi la mankon, ke la ŝtato faras tro da monopoligoj; la scienc-teknikaj institucioj akiru povon mem disvolviĝi kaj vivforton por aŭtomate servi al la ekonomia konstruado; likvidi apartiĝon de esplorado disde aplikado, akceli la kunlaboron kaj unuigi inter la esploraj kaj projektaj unuoj, altaj lernejoj kaj entreprenoj, por ke la diversfakaj scienc-teknikaj fortoj formiĝu en racian dispozicion. Samtempe kun tio, oni ŝanĝu tro da limigoj al la scienc-teknikistoj kaj la staton, ke talentuloj ne povas racie transposteniĝi kaj intelektaj laboroj ne estas respektataj. La reformo celas aperigi pli kaj plene elvolvi ilian talenton.

EKSPRESA POŬTO EN ĈINIO

La ekspresa poŝto ekaperis en la mondo en la 70-aj jaroj. La Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de

Ĉinio entreprenas ekde julio 1980 internacian ekspresan poŝton. Ĉinio nun havas tiufanke kunlaborajn rilatojn kun pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Argentino, Aŭstralio, FR Germanio, Brazilo, Kanado, Francio, Britio, Japanio, Nederlando, Svisio, Egiptio, Luksemburgio, Norvegio, Svedio, Portugalio, Danlando, Hongkong kaj Aŭmen. La ekspresa poŝto estas 5-oble pli rapida ol la ordinara aerpoŝto.

Ekde la 1-a de novembro 1984 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio komencis entrepreni enlandan ekspresan poŝton en Pekino, Kantono, Ŝanhajo, Ŝenĝen, Ŝĵian, Ĉengdu kaj aliaj 19 urboj. Nun la ekspresaj poŝtaĵoj senditaj el Pekino povas atingi aliajn landojn en 2 kaj 3 tagoj kaj la supre menciitajn urbojn en unu tago.

GRANDA KOMPUTILA RETO FONDITA EN PEKINO


La 13-an de marto, granda komputila reto ekfunkciis en la komputila centro Hŭafeng, Pekino.


Ĝi estas kompare granda komputila ret-sistemo starigita en Ĉinio. Ĝi ampleksas unu grandan komputilon, kvar mezgrandajn kaj malgrandajn komputilojn kaj ses malgrandajn komputilojn de filiaj uzantoj. Ĝi havas sume 38 longdistancajn finojn kaj diametron de ĉ. 40 kilometroj. Ĝi estas uzata ĉefe en la scienc-kalkulado, inĝenierada projektado, entreprena administrado k.a. Ĝia fondiĝo donas favorajn kondiĉojn al starigo de donitaĵa bazo kaj informa sistemo kaj efektivigo de la reta komunikado en-kaj eksterlanda.

LA ĈINA SUDPOLUSA METEO-STACIO AGNOSKITA DE LA MONDA METEO-ORGANIZO

La unua ĉina sudpolusa meteo-stacio la Granda Muro estas agnoskita de la Monda Meteo-organizo, kiu akceptis ĝin kiel unu el la

La Ĉina Sudpolusa Meteo-stacio kun siaj laborantoj en la Suda Poluso





Gaü Gjanhüa en konkurso



Han Ajping en konkurso

mondaj meteostacioj kaj oficiale donis al ĝi la ĉifron 89058.

La stacio estis starigita la 14-an de februaro, ĉi-jare. Ĝi estas la unua meteo-stacio starigita de Ĉinio ekster ties teritorio.

ĈINIO GAJNIS 6 ĈAMPIONECOJN EN LA MONDA TABLOTENISA ĈAMPIONECA KONKURSO

La 7-an de aprilo finiĝis en Gothenburg, Svedio, la 38-a Monda

Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso, kiu daŭris 11 tagojn. Post kiam Ĉinio gajnis la viran kaj virinan teamajn ĉampionecojn, ĉinaj sportistoj gajnis aliajn 4 ĉampionecojn de vira kaj virina



Art-sketado

unuopaj ludoj, virina duopa ludo kaj miks-duopa ludo.

La finaloj de la vira kaj virina unuopaj ludoj kaj virina duopa ludo okazis inter ĉinaj sportistoj. Ĝjang Ĝjaljang gajnis la ĉampionecon de vira unuopa ludo, Caŭ Janhŭa tiun de virina unuopa ludo. Daj Lili kaj Geng Liĝjŭan gajnis la ĉampionecon de virina duopa ludo. Caj Ĝenhŭa kaj Caŭ Janhŭa venkis la ĉeĥoslovakajn tablotenisistojn J. Pansky kaj M. Hrachova per 2:1 kaj gajnis la ĉampionecon de miksduopa ludo.

La svedaj tablotenisistoj M. Appelgren kaj U. Carlsson gajnis la ĉampionecon de vira duopa ludo.

MONDAJ ART-SKETAJ STELOJ EN PEKINO

La 20-an kaj 21-an de marto dekmiloj da rigardantoj en la stadiono Ĉefurbo spektis la rondiran prezentadon de mondaj artsketaj steloj — la plej altnivela artsketistoj.

La rondira art-sketista taĉmento de 1985 estis organizita de la Internacia Sketista Unio. Ĝi konsistis el la sportistoj, kiuj gajnis la unuajn 6 lokojn en la solludo kaj la unuajn 3 lokojn en la parludo kaj surglacia danco en la Monda Art-sketa Ĉampionea Konkurso finita en Japanio en la mezo de marto. La steloj venis el Usono, Sovetunio, DR Germanio, Kanado, Ĉeĥoslovakio kaj FR Germanio. Tiffany Chin (Ĉen Tingting) sola estis ĉin-devena usona sportistino.

ĈINOJ GAJNIS ĈAMPIONECOJN EN LA TUT-ANGLIA VOLANA ĈAMPIONECA KONKURSO

Juna ĉina volanisto Ĝaŭ Ĝjanhŭa venkis faman danan volaniston Froston en la Tut-anglia Volana Ĉampionea Konkurso de 1985 kaj gajnis la ĉampionecon de vira unuopa ludo.



La Ĉina Vira Tablotenisa Teamo kun la pokalo sur la podio

Han Ajping venkis alian ĉinan volanistaron Li Lingŭej per 2:0 kaj gajnis la ĉampionecon de virina unuopa ludo. Ĉinaj volanistinoj Li Lingŭej kaj Han Ajping gajnis la ĉampionecon de virina duopa ludo.

ĈINIO GAJNIS LA ĈAMPIONECON EN LA AZIA JUNULA PIEDPILKA ĈAMPIONECA KONKURSO

La ĉina Junula Piedpilka Teamo gajnis la ĉampionecon en la 24-a Azia Junula Piedpilka Ĉampionea Konkurso per du gajnoj kaj unu egalo en la tri ludoj. Dank' al tio, ĝi gajnis rajton en la nomo de Azio partopreni en la finala konkurso de la Monda Junula Piedpilka Ĉampionea Konkurso okazonta en Moskvo en aŭgusto ĉi-jare.

Tiu honoro estas unufoja por la Ĉina Junula Piedpilka Teamo, kiu 5-foje partoprenis la azian ĉampionecon konkurson kaj en la lasta konkurso gajnis la duan lokon.

KOREKTO

Bonvolu legi Rosaria anstataŭ Rosania kaj Argentino anstataŭ Meksikio en la klarigo de la maldekstra bildo de p. 26 de n-ro 2/1985.

Anstataŭ "pasinta jaro estis" legu "kuranta jaro estos" en la redakcia noto p. 2, n-ro 2, 1985.

EKSARISTOKRATOJ DE TIBETO

de GE LAJ

EN laborkunveno de la tibeta popola registaro iu pli-ol-80-jara tibetano fervore prezentis siaj opiniojn kaj proponojn pri la laboro en Tibeto. Kvankam grandaĝa, li laboras kun alta entuziasmo. Li estas Gaŝjue Ĉjueĝjinima, kiu estis aristokrato fame konata en Tibeto, kaj nun funkcias kiel vicprezidanto de la Tibeta Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Antaŭ la paca liberigo de Tibeto li havis gravan oficon en la malnova tibeta registaro.

En la pasinteco Tibeto havis pli ol 200 monaĥajn kaj laikajn aristokratojn kaj ĉ. 2 000 monaĥajn kaj laikajn oficistojn kaj superajn monaĥ(in)ojn. En la fino de la 50-aj jaroj iuj aristokratoj, eksoficistoj kaj superaj monaĥ(in)oj forlasis Tibeton kaj forkuris alilanden, tamen estis nemalmultaj, kiuj volis vidi la novan paĝon de la tibeta historio kune kun la tieaj mizeraj popoloj. Kiel ordinaraj tibetanoj, la aristokratoj, oficistoj kaj superaj monaĥ(in)oj travivis la socian ŝanĝiĝon plej grandskalan kaj plej profundan en la tibeta historio kaj trovis sian lokon en la nova vivo. Inter ili troviĝis Gaŝjue Ĉjueĝjinima.

Hodiaŭ en Tibeto troviĝas multaj, kiuj havis saman travivaĵon kiel li. Ĝjuekang Tudengnima estis supera monaĥo-oficisto kaj nun funkcias kiel vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tibeta Popola Kongreso kaj respondecas pri scienc-teknika laboro de Tibeto. Ĉjaba Gesang'ŭangduj, pasinta aristokrato, nun

estas vicurbestro de Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto, kaj respondecas pri ekonomia laboro de la urbo. Kaj Dŭoĝjiĝa, unu el la respondeculoj pri financoj de Lhasa, estis antaŭe viva budho de la ruĝa sekto de lamaismo. Ili aktive partoprenas en administrado kaj konstruado de Tibeto kaj kontribuas sian talenton al sia hejmloko.

VIVA BUDHO EN PAŬTEJOJ

En la lamaisma ceremonio aŭ tradicia festotago sur la paŝtejoj de la gubernioj Baĉen, Njanrong, Biĵu, Sag kaj aliaj sur la nord-tibeta stepo iam vidiĝas supera lamao en frokoj kaj kun rozario en la mano. Li ne nur recitas sutrojn kun popolamasoj, sed ankaŭ petas iliajn opiniojn pri la laboro de la popola registaro kaj transdonis ilin al la koncernaj organizoj. Kaj krome, li ofte prezentas al la paŝtistoj siaj rimarkigojn pri disvolvo de produktado. Trovinte, ke kaŭze de la manko de la scioj pri multispeca ekonomio, la produktado kreskas malrapide, li foje-foje konigis al ili la koncernajn sciojn kaj politikojn de la registaro. Helpate de li multaj okupiĝis ĉefe pri brutobredado kaj rapide riĉiĝis. Oni kun ĝojo diris, ke en la pasinteco la viva budho nur akceptis donacaĵon de la amasoj, tute ne zorgante pri produktado, sed nun li zorgas kaj pri produktado kaj pri la vivo de la amasoj. Tia viva budho estas bonvena. Foje li rimarkis en iu malproksima paŝtejo, ke oni kolektas lanon de gruntbovoj kaj ŝafoj per man-

tiro kaj tranĉado. Tia laborefiko estis malalta kaj ofte vundis la haŭton de la brutoj. Li raportis tion al la loka registaro kaj post nelonge la lokaj paŝtistoj ellernis uzi elektrajn lantondilojn.

La lamao, kiu aktive kontribuas sian forton al la disvolviĝo de Tibeto, estas pli-ol-50-jara supera viva budho Junĝonggaŭa de Ben-sekto de lamaismo en la gubernio Baĉen de la norda Tibeto. Li loĝas en la urbeto Naĉju. Li aktive partoprenas en budhisma renkontiĝo. En la fino de 1984 li vizitis Nepalon kiel membro de la Ĉina Budhisma Delegacio. Nun li funkcias kiel vicprezidanto de la Naĉju-a Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Lalu Ĉaj'ŭangdŭoĝji





Aleĉjunze (maldekstre) kaj liaj edzino kaj filo

MEMBRO DE LA TUTLANDA KONFERENCO

En la historia ŝanĝiĝo neniam vidita en Tibeto iuj aristokratoj trovis la vojon de nova vivo nur post longa tempo. Inter ili estis Lalu Ĉaj'ŭangdŭoĝji, unu el la ok plej potencaj aristokratoj en la malnova Tibeto.

14-jara, li komencis plenumi oficon en registaro. Li funkciis sinsekve kiel guberniestro, sekretario de la tibeta registaro kaj financa oficisto. 33-jara li ekfunkciis kiel unu el la kvar plej altaj oficistoj de la tibeta registaro. Poste li laboris kiel direktoro de la regiono Ĉabdo, direktoro pri greno en la tibeta registaro kaj komandanto de la ribelantaj trupoj. Antaŭe li posedis 25 bienojn kun 5 000 servutuloj.

En 1959 li partoprenis en la milita ribelo kontraŭ la tibeta reformo. Post malvenko de la ribelo li dronis en teruron, pensante, ke oni lin mortigos. Sed en aŭgusto de 1965 li estis amnestita. Poste, en certa tempo, li oku-

piĝis pri kulturado de legomoj kaj greno en la antaŭurbo de Lhasa. Li estis multe helpata de la loka registaro kaj tibetanaĵ kamparanoj en la nova vivo. Tiam li, kiu antaŭe kontraŭstaris al la historia reformo de Tibeto, ŝanĝis sian penson kaj fine forlasis sian starpunkton kontraŭ plejparto de la tibetanoj.

En 1977 li estis elektita kiel membro de la Konstanta Komitato de la Tibeta Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj poste kiel ĝia vicprezidanto. En 1980 li estis elektita kiel membro de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

En la lastaj jaroj li aktive plenumis la laboron por ordigi historiajn materialojn de la pasinta tibeta registaro. Li verkis materialojn en pli ol dek volumoj pri la tibeta historio. Inter ili la libro "Longŝja, Mia Patro" rakontas pri la historio de damninda imperiista agreso al Tibeto kaj pri eventoj influhavaj en la moderna historio de Tibeto.

Li loĝas en Lhasa. Lia edzino Lalu Sŭolangdeĝji estas membro de la Tibeta Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Iliaj ses gefiloj, ĉiuj plenkreskaj, laboras en la Akademio de Sociaj Sciencoj, la Religia Buroo de la aŭtonoma regiono kaj la Aŭtoriparejo de Lhasa.

REVENO AL LA PATROLANDO

En la lastaj jaroj pli kaj pli multaj el la aristokratoj, kiuj forlasis Tibeton kaj ekvivis eksterlande en la 50-aj jaroj, revenis al Tibeto por viziti la hejmlokon kaj siajn parencojn. Propraokule vidinte la grandan ŝanĝiĝon de Tibeto, nemalmultaj el ili decidis fiksloĝi en la patrolando por pasigi siajn lastajn jarojn. El ili estas Aleĉjunze.

Aleĉjunze estis riĉa komercisto, poste li edziĝis al filino de aristokrato. En 1956 li forlasis Tibeton kaj veturis eksterlanden. En 1959, kiam en Tibeto okazis milita ribelo, li subtenis la ribelantajn trupojn per municio.

En 1980 kaj 1982 li revenis al la patrolando por viziti siajn parencojn kaj rigardi Tibeton, Siĉŭan kaj Ĉinghaj. Kiam li propraokule vidis la ŝanĝiĝon de tiuj regionoj kaj la vivo de tibetanoj, li estis tre kortuŝita kaj decidis fiksloĝi en la patrolando.

Nun lia familio loĝas en Pekino kaj vivas stabile kaj komforte. Ilia loĝejo bonorda kaj eleganta estas meblita per sofoj, tapiŝo kaj aliaj. En la ĉambro estas ankaŭ budha niĉo.

En la Dua Plena Sesio de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco la 66-jara Aleĉjunze estis elektita kiel ĝia membro. Nun li laboras en la konferenco kaj ankaŭ verkas artikolojn pri siaj travivaĵoj.


Pejzaĝoj de la Tibeta

Altebenaĵo

Fotoj de LIŬ ĈENGHANG kaj LIŬ TJEŜENG




Montarbaro



Kançênçunga, la tria alta montpinto de la mondo

Paštejo en mateno





Če Ĵau-lago



**JADAJ HOMFIGUROJ EN TOMBO
DE REĜA KROMEDZINO
ANTAŬ 3 000 JAROJ**

de CAŬ BAJLONG
Fotoj de ĜAŬ ĈJŬAN



EN 1976 ĉinaj arkeologoj trovis tombon de reĝa familiano de Ŝang-dinastio (de ĉ. la komenco de la 17-a jarcento a.K. ĝis ĉ. la 11-a jarcento a.K.) en Ŝjaŭtun proksime de la urbo Anĵang de la provinco Henan. Ĝi estis bone konservata, oni trovis en ĝi multe da entombigitaĵoj, el kiuj estis bronzaĵoj, jadaĵoj, eburaj skulptaĵoj, ceramikaĵoj, ŝtonaj iloj k.a. Ili estas la plej perfektaj materialoj ĝis nun trovitaj en la reĝaj tomboj de Ŝang-dinastio.

Laŭ gravuraĵoj sur bronzaĵoj oni sciis, ke la mastrino de la tombo nomiĝis Fuhaŭ. Estas la unua fojo, ke oni povas precize juĝi mastron kaj daton de tombo de Ŝang-dinastio. En historiaj verkoj ne troviĝas skribaĵo pri Fuhaŭ, sed ŝia nomo multfoje estis trovita en skriboj sur ostoj kaj testudaj ŝeloj. Esplorado konstatis, ke Fuhaŭ estis kromedzino de la famkonata reĝo Uding de Ŝang-dinastio. Uding plurfoje atakis najbarajn landojn por grandigi la influferon de Ŝang-dinastio. En tiuj militoj Fuhaŭ estis grava helpanto de la reĝo. Ŝi partoprenis militojn kontraŭ nordokcidenta, sudokcidenta kaj orienta landoj. Foje ŝi komandis dek tri milojn da soldatoj por militi kontraŭ malgranda regno Ĉjang. Ŝi mortis pli frue ol ŝia edzo. Skriboj sur ostoj kaj testudaj ŝeloj notis, ke Uding malĝojis pro ŝia morto kaj plurfoje vidis ŝin en sonĝo. La abundaj elegantaj entombigitaĵoj montris, ke ŝi estis alte taksata.

La objektoj trovitaj en la antaŭe prifositaj tomboj de Ŝang-dinastio plejparte estis bronzaĵoj, sed tre malmultaj jadaĵoj. Tamen oni trovis en la tombo de Fuhaŭ pli ol 750 jadaĵojn, kiuj superis la pasintajn elterigitaĵojn kaj la konservitajn rarajn objektojn, ĉu en multeco de specoj, ĉu en deli-

kateco. El ili la plej okulfrapaj estas pli ol dek jadaĵoj homfiguroj kun malsamaj aspektoj kaj vivecaj mienoj. Ili estas ne nur delikataj artaĵoj, sed ankaŭ gravaj materialoj por esplori sidpozon, kostumon kaj vivmanieron de la homoj en Ŝang-dinastio antaŭ tri mil jaroj.

Laŭ la elterigitaj jadaĵoj homfiguroj oni konstatis, ke la homoj en Ŝang-dinastio plejparte sidis surgenue, ĝenerale kun koksoj sur la kalkanoj kaj manoj sur la genuoj, kaj la aliaj sidis kun gamboj fleksitaj antaŭen. Hodiaŭ tian sidpozon oni ankoraŭ povas vidi en Japanio.

Tiuj jadaĵoj homfiguroj portas du-specajn vestojn: Iuj portas veston kun ambaŭ finaĵoj de la kolumo unu sur la alia, mallarĝaj manikoj longaj ĝis la pojnoj, larĝa zono ĉirkaŭ la talio kaj basko ĝis la maleoloj en genua sidpozo. Oni konjektis, ke la vesto longiĝis ĝis sub la genuoj. Sur la vesto estis nubaj desegnoj kaj antaŭ la fronta parto pendis ŝirmilo. La aliaj portas veston kun pli alta posta kolumo kaj antaŭa kolumo malferma, mallarĝaj manikoj longaj ĝis la pojnoj kaj basko ĝis la kruroj. Ankaŭ la vesto surhavas nubajn desegnojn. Unu jada homfiguro surbruste havas bestokapan bildon, laŭ tio oni konjektis, ke tiamaj homoj havis tatuan moron.

Iuj el la jadaĵoj homfiguroj havas surkape rondan ringon, kiu eble estis populara por homoj en Ŝang-dinastio, aliaj portas antaŭ la ringo rondan tubon, eble por ligi la hararon kaj simboli la socian pozicion; triaj portas ĉapelon kun plata supraĵo altan aŭ malaltan, kiu estis eble por nobeluloj.

Por la jadaĵoj homfiguroj estas kvin specoj de formoj de haroj:



La unua havas longan harplektaĵon malantaŭ la dekstra orelo. La harplektaĵo havas ringan formon kaj ĉirkaŭas la malantaŭan parton de la kapo, kun la finaĵo de la harplektaĵo metita sub ĝia komenca parto. La dua havas mallongan harplektaĵon surverte, kiu pendis apud la kolo. La tria havas ringan hararon mallongan, kiu estis eble por la sklavoj. La kvara havas du harligojn sur la kapo, kiuj eble estis faritaj por la infanoj. La kvina havas harligon, pendantan post la kapo, kiu estis aranĝita eble por la maljunuloj.

La trajtoj de la jadaĵoj homfiguroj montriĝas jene: ilia frunto estas elstara, la zigomoj altaj, la brovoj densaj kaj la okuloj grandaj. Ili havas okulfrapajn trajtojn de la mongola raso.

El tiuj jadaĵoj homfiguroj troviĝas du nudaj infanoj ina kaj vira kun du harligoj surkape, kiuj konservas postsignon de la primitiva socio en Ĉinio adoranta generadon. Homoj de Ŝang-dinastio estis superstiĉaj je fantomoj kaj dioj. La paro da jadaĵoj homfiguroj eble estis kunportaĵo de Fuhaŭ antaŭ morto por petegi benon de Dio, ke ŝi nasku multajn idojn. En vilaĝoj de norda Ŝenŝji-provinco en Ĉinio ĝis nun estas moro, ke en edziĝa tago oni algluas papertranĉaĵon pri infanoj kun du harligoj surkape por aŭguri feliĉon.

LA ELEMENTO MANKA

(Tajlanda Popolrakonto)

Mallongigis kaj el la taja tradukis HAKU-MO'OLELO-MEHA-MEHA (Britio)

Dediĉita al ĉiuj, kies penadoj dum la pasintaj 35 jaroj helpis en la preparado kaj ekspedado de la alte ŝatata kaj ĉiam pliboniĝanta EPC.

Sub la regado de la reĝo Naraj, vivis apud Ajutthaja geedzoj nomataj Ha Tong kaj Song Saj, kiuj estis homoj bonhavaj sed ne riĉaj. Song Saj estis virino inteligenta kaj laborema, dommastrino bonega kaj praktika, tiel ke, se ŝia edzo laborus en ia negoco bonorda kaj bone funkcianta, kiel faras la plejmulto de la homaro, nenio malhelpus lin fariĝi post kelka tempo civitano honorinda kaj riĉa. Ha Tong, tamen, nek agis nek laboris kiel la aliaj. Male, ekde sia edziĝo al Song Saj, li pasigis la tutan tempon, studante la alkemion, kaj serĉante formulojn por ŝanĝi la malkaran, bruneruĝan kupron en puran, brilan, flavan oron. Ĉi tion li faris dum pluraj jaroj sen ia ombro da sukceso. Kvankam lia pacienco, malgraŭ tiom da provoj, ankoraŭ ne elĉerpiĝis, la propraj rimedoj kaj tiuj de lia edzino montriĝis baldaŭ elspezotaj. Song Saj fine maltrankviliĝis kaj proteste atentigis lin, ke ne nur certe malsukcesos liaj penoj, sed ankaŭ elĉerpiĝos ilia mono. Ha Tong tamen rifuzis aŭskulti, dirante nur, ke ŝi devas pacienci ĝuste kiel li.

En malespero ŝi vizitis sian patron kaj rakontis pri la konduto freneziga de la edzo. Ŝia patro aŭskultis senparole; sed post kiam ŝi foriris, li sendis serviston

al la bofilo kun la peto, ke tiu lin vizitu. Ha Tong tuj ekiris, kaj ĉe lia alveno, post la kutimaj salutoj, la maljunulo alparolis lin jene:

“Oni diras, ke vi tre interesiĝas pri la alkemio kaj jam de longa tempo faras eksperimentojn; sed malgraŭ via ĝisnuna manko de sukceso, al vi neniam venis en la kapon konsulti min mem pri ĉi tiu malfacila afero. Eble vi pensas, ke nenian konon mi havas ĉi-teme, do mi vin certigu, ke mi longatempe praktikis tiun arton kaj profunde sondis ĝiajn sekretojn. Efektive, mi scias la recepton de iu solvaĵo,

kiu povas en palpebruma daŭro ŝanĝi kupron en la plej puran oron. Sed nun mi estas maljunulo kaj devas rezigni la taskon, ĉar la preparado de la solvaĵo postulas jarojn da pacienca laborego.”


Ha Tong rigardis sian bopatron preskaŭ adorante, ĉar li jam imagis, ke fine realiĝos lia revo. Do li kunmetis la manplatojn kaj ilin respektive levante, respondis: “Kara bopatro, mi petegas, ke vi indiku al mi la precizan naturon de ĉi tiu solvaĵo. Eĉ se la preparado postulos multajn jarojn, mi persistos ĝis mi fine ĝin produktos, ĉar jam de longe mi vane penegas.”



Vidante ke la bofilo kredis liajn vortojn, la maljunulo plue diris: “Ĉiuj elementoj necesaj estas ĉemane en mia domo — ĉiuj krom unu. Estas ĉi tio, kiun vi devas serĉi kaj kun tiom da peno akiri; tamen ĝi estas neniel malfacile havebla. Ĉu vi trovos kvanton sufiĉan — tio dependas sole de via propra lerteco. La elemento bezonata estas la lanugo, kiu troviĝas sur la folioj de bananujoj; kaj ĝi devas pezi ne malpli ol du *ĉang*-ojn.* Sed ne pensu, ke vi povas kolekti la lanugon de sur la plantoj de alioj — ili devas aparteni al vi mem, kaj la fosadon de ĉiu truo vi devas akompani per sorĉkantoj solene ripetitaj. Komprenoble, ju pli baldaŭ vi deziras akiri la bezonatan kvanton da lanugo, des pli da bananodraĵoj** vi devos meti en la grundon. Se al vi mankas sufiĉe da rimedoj por la entrepreno, mi laŭeble vin helpos.”

Ha Tong jam apenaŭ povis regisian eksciton, tiel infektita li estis de la deziro atingi sian celon. Li sciis, ke malgrandiĝis liaj rimedoj dum la pasintaj jaroj da eksperimentado, kaj reveninte hejmen, li rakontis al sia edzino pri la promeso de ŝia patro helpi ilin realigi la projekton. Ankaŭ ŝi egale ĝojis kaj konsentis fari ĉion eblan por sukcesigi la planon.

Nun komenciĝis periodo da vigla agado. La paro aĉetis kelkajn kampojn, dungis laboristojn por ilin pretigi por la plantado kaj senprokraste efektivigis la ideojn de la maljunulo. Ha Tong tamen neniel interesiĝis pri la nombro de la plantoj; li ne scivolis, kiom da ili entenas ĉiu *raj*-o*** da grundo; sed apenaŭ kreskis la plantoj, kiam li dediĉis sian plenan atenton al la ĉiutaga kolektado kaj zorga pesado de la lanugo. Lia diligenta edzino dume pasigis la tutan tagon, kon-



trolante la plantojn, elektante la grapolojn dehakendajn kaj ilin vendis, jen freŝaj, jen sunsekigitaj.

Pasis tiel tri jaroj. La paro akiris bonan reputacion en la najbaraĵo. Ilia domfronto, kiu bordis la riveron, fariĝis unu el la plej gravaj kajoj en la ĉirkaŭaĵo por la aĉetado kaj vendado de bananoj. Je ĉiu horo de la tagnokto, kuniĝadis sur la rivero grupoj da boatoj transportantaj aĉetontojn — sed Ha Tong ankoraŭ ne demandis sin, kion signifas ĉi tiu aktiveco, aŭ kiel statas la negoco. Ĉiumatene li frue ellitiĝis kaj iris en la plantejojn kontrolante ĉu la laboristaro flegis la plantojn kiel eble plej zorge, por ke ili bone kresku kaj produktu foliojn belajn, longajn kaj dense lanugokovritajn. Kaj ĉiuvespere ĉe la alveno al la hejmo, li reportis kvanteton da lanugo kaj ĝin ekzakte pesis. Tiel pasis du pliaj jaroj; kaj sekve de kvinjara energia penado li fine akiris la du *ĉang*-ojn da lanugo bezonatajn de la bopatro.

Kredante ke la revo de lia vivo estas efektiviĝonta, li ensakigis la

lanugbulon alte ŝatatan kaj kuris al la hejmo de la maljunulo. Kun okuloj brilaj kaj manoj tremantaj li eligis la du *ĉang*-ojn da lanugo, kriante: “Finfine mi havas la elementon mankan, do ni povas tuj komenci niajn eksperimentojn!” La bopatro tamen nur ridis kaj diris: “Jes, vi nun fariĝos riĉulo!”

Ĉe tio ĉi, Ha Tong preskaŭ frenezigiĝis de ĝojo: lia vizaĝo ruĝiĝis, kaj li tiom tremis, ke li apenaŭ povis stari senmova.

La maljunulo, sen plu paroli, sendis serviston por venigi Song Saj. Kiam ŝi alvenis, li demandis, ĉu ŝi lastatempe enspezis iom da mono per bananovendado. Aŭdinte ke ŝi jesas, li petis, ke ŝi ĉion alportu.

Ha Tong iom suspektis kaj sidis konfuzita, dum li sin demandis, kiel rilatas la mono akirita per bananovendado al la transmuto de metaloj.

Post nelonge Song Saj revenis kaj antaŭ liaj larĝe malfermitaj okuloj elnombris la grandan monsumon akiritan dum la pasintaj


(Daŭrigo sur p. 63)



*Bančen Erdeni (la kvara de maldekstre), vic-
prezidanto de la Konstanta Komitato de la*

*Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, gratulas
la bulgarajn artistojn pro ilia bela prezentado.*

Bulgaraj muzikistoj



Laŭ invito de la Ĉina Kompanio de Ekstera Prezentado, bulgara voĉ- kaj instrument-muzika grupo el ok membroj vizitis Pekinon de la 19-a ĝis la 23-a de aprilo kaj prezentis tie verkojn de Ŝopeno, Rudolfo kaj aliaj muzikistoj.

La bulgaraj artistoj pririgardis historiajn restaĵojn de Pekino kaj gastis en la Centra Konservatorio, la plej supera muzika lernejo de Ĉinio, kie ili interŝanĝis spertojn kun ĉinaj fakuloj, profundigis la interkomprenon kaj plifortigis la amikecon.

Krome, la bulgaraj artistoj ankaŭ turneis en Tjanĝin kaj Ĉengdu.

en Pekino

Fotoj de LAŬ BAJ



Bulgaraj artistoj interparolas kun studentoj de la Centra Konservatorio.



**AKTIVADOJ DE JUNNAN-AJ
ESPERANTISTOJ**

Dum la vintraj ferioj de 1984, la Junnan-Nacimalplimulta Instituto kaj Junnan-a Esperanto-Asocio kune funkciigis intensigan Esperanto-kurson, en kiu partoprenis 156 lernantoj de 17 naciecoj el 7 universitatoj. Pekinaj esperantistoj Ĝoŭ Ĉjanjun kaj Ĉin Kajĝji instruis al ili Esperanton. Dank' al lernado, la kursanoj jam havas rudimentojn pri Esperanto, nemalmultaj el ili, kun deziro daŭrigi la lernadon, enskribiĝis por la mezgrada Esperanto-kurso funkciigata de la Junnan-a Nacimalplimulta Instituto.

Por kontentigi la deziron de sciencistoj kaj teknikistoj pasigi la promocian ekzamenon kun Esperanto kiel nedevisa fremda lingvo, la Junnan-a Esperanto-Asocio kaj Junnan-a Fremdlingva Asocio kune funkciigis en marto Esperanto-kurson por sciencistoj kaj teknikistoj post la sankcio de la Fremdlingva Trejna Centro de

la Junnan-a Eduka Departemento. 30 homoj partoprenis en la kurso, kiu daŭros 3 monatojn. Post la sukcesa trapaso de ekzameno la lernantoj rajtos ne partopreni en la ekzameno de nedevisa fremda lingvo.

**OFICIALAJ INFORMOJ DE
LA AKADEMIO DE
ESPERANTO**

La akademio elektis s-ron Baldur RAGNARSSON direktoro de la Literatura Sekcio. Plie, pro la demisio de Prof. Geraldo MATTOS, s-ro Bernard GOLDEN estis elektita kiel direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

Studado de la problemoj pri landnomoj daŭras; espereble baldaŭ povos esti eldonitaj unuaj rekomendoj. Aliflanke la Sekcio pri Gramatiko establis raporton pri sia studo de la prepozicio post la ago-substantivoj; la akademio nun studos tiun raporton kaj post voĉdono eldonos sian decidon.

TEATRO KAJ ESPERANTO

La granda teatra aranĝo Pupa teatra Internacia Festivalo, kiu jam 18 jarojn uzas Esperanton, ĉi-

jare okazos en Zagreb (Jugoslavio) inter la 24-a de aŭgusto kaj la 1-a de septembro. Prezentos profesiaj teatroj el Belgio, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Islando, Japanio, Kanado, Svedio, Pollando, Sovetunio kaj Jugoslavio.

FAMILIA ESPERANTO-KLUBO

Por omaĝi la centjarigon de la internacia lingvo, membroj de la familio Worsztynowicz fondis familian Esperanto-klubon. Ĝis la jubile-jaro 1987 laŭ ilia intenco la nombro de la familianoj flue parolantaj Esperanton atingos 100.

ESPERANTO EN LERNEJO

En la lernojaroj 1984/85 la libervola laborrondo Esperanto estas daŭrigata de sinjoro SCHIFFER en la superaj fakklasoj de la metilernejo en Villingen, FRG. Nur la lernantoj de la superaj fakklasoj rajtas partopreni la laborrondon Esperanto. El la 59 lernantoj de la fakklasoj 24 decidis lerni Esperanton.


ESPERANTISTAJ FERIADOJ

Vroclava Filio de la Pola Esperanto-Asocio invitas al tradi-

Partoprenantoj de la 24-a Kongreso de Esperanto en la Aŭstralia Nacia Universitato en januaro 1984



S-ro Menuet, vicurbestro de la urbo Rueil-Malmaison, Francio, en la Esperanta ekspozicio okazigita de gesanoj L.Z. Enizan dum sportfesto en la urbo en 1984. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas ĉinaj Esperantaj eldonaĵoj.



ciaj esperantistaj feriadoj en Miedzygorze:

La 4-a Internacia Feriado "Esperanto-Hejme", kiu okazos en la tagoj 18-31 de aŭgusto, 1985 kaj la 21-a Internacia Esperantista Feriado "Ora Pola Aŭtuno", kiu okazos en la tagoj 2-15 de septembro, 1985. En ĉiu feriskipo samtempe ferios 430 esperantistoj.

NOVAJ ELDONAĴOJ

1. Dum la 58-a Internacia Kongreso de S.A.T. okazonta en Nederlando de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto, eldoniĝos speciala koverto kun poŝtstampo de la kongreso. Oni povas mendi tiujn kovertojn per pago de F. 2.50 (nederlanda mono) aŭ 3 internaciajn respondkuponojn.

2. La Asocio de Verduloj Esperantistaj eldonas sian bultenon "AVENO" (t.e. AVE-Novajoj). Ĝi aperas almenaŭ kvar fojojn jare, kaj temas pri ekologiaj aferoj. Por ricevi ekzempleron de la bulteno sendu 2 internaciajn respondkuponojn al: Jean Claude THUMERELLE, Place de la station 16, B-7790 WARNETON, Belgio.

NI FUNEBRAS

La 31-an de januaro 1985 forpasis en Zagrebo Nikola Ŝegota,

membro de la prezidantaro de la Kroatia Esperanto-Ligo kaj prezidanto de la kroatia komitato por 100-jariĝo de Esperanto.

(Daŭrigo de p. 59)

kvin jaroj: ne malpli ol 20 000 bat-ojn.

Apenaŭ Song Saj finis sian elnombradon, kiam la maljunulo turnis sin al Ha Tong kaj diris: "Rigardu, kiom da mono vi ricevis per mia recepto por la ŝanĝado de metaloj! Nu, se vi deziras ŝanĝi ĉi tiun monon en oron je 12, 16 aŭ 24 karatoj, aŭ laŭprefere en diamantojn kaj safirojn, aŭ en elefantojn, bovinojn kaj bubalojn, aŭ eĉ en robojn el silko — tion vi povas fari tute laŭ via plaĉo. Mia opinio, ĉi tiu recepto mia estas multe pli bona ol tiuj, kiujn vi studadis dum tiom da jaroj, kaj kiuj neniam povos ŝanĝi la leĝojn de la naturo!"

La maljunulo ĉesis paroli; sed Ha Tong restis muta, ne povante eldiri eĉ unu vorton, ĉar nur nun naskiĝis en li la fakto, ke ĉi tiun profiton lia edzino ricevis per la simpla vendado de bananoj. Kvankam li kompreneble ĝojis pro la mono akirita, li tamen ĉagreniĝis pro la trompo fare de la maljunulo. Dum kelka tempo interbatalis en lia menso kaj plezuro kaj ĉagreno, sed fine lia plezuro venkis, kaj aperis sur lia vizaĝo gaja rideto.

* du ĉang-oj: 1209 gramoj.

** draĵo: forta ŝoso (tigo) kreskanta de la subtera rizomo, per kies transplantado oni povas reprodukti novan planton.

*** raj-o: 1 600 kvadrataj metroj.

NOVAJ LIBROJ EL LA

FENIKSA LIBRARO
DE LA ĈINA
ESPERANTO-
ELDONEJO



DEK SES URBOJ
DE ĈINIO

Generala skizo de 16 ĉinaj grandaj urboj, inkluzive de la ĉefurbo Pekino, industriaj kaj komercaj urboj Ŝanhajo, Tjanĝin kaj Kantono, famaj historiaj urboj Nankino, Ŝji'an kaj Ĉengdu, ktp., kun koloraj kaj nigra-blankaj bildoj.

Formato: 120×186 mm. 176 pĝ.

Prezo: £ 1,90 US\$ 3,90

Numero: 17-Es-1885P

MIA VIVO

La libro rakontas, kiel vivas ĉinoj el diversaj socitavoloj, inter kiuj troviĝas advokato, arkeologo, biologo, dancistino, flegistino, maristo, ŝoforo, laboristo, kamparano, lamao kaj eĉ frato de la lasta imperiestro de Ĉinio. Kun iliaj vivfotoj.

Formato: 120×186 mm. 128 pĝ.

Prezo: £ 0,80 US\$ 1,70

Numero: 17-Es-1884P

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

NESATIGEBLA LUPO


Lun vesperon, viandisto iris hejmen de butikoj. Li dorse portis hokon, sur kiu pendis pecoj da nevendita viando. Kiam li trairis monteton, lupo postkuris lin.

Tuj antaŭ ol la lupo kuratingis lin, li haste ĵetis pecon da viando surteren, por ke la lupo ne plu postkuru lin, manĝinte la viandon. La viandisto rapidis antaŭen. Tamen ĝi denove aperis malantaŭ li, formanĝinte la viandon. Pensante, ke eble ĝi ankoraŭ ne estas satigita, li do ĵetis alian pecon da viando kaj rapide iris antaŭen.

Ekster lia atendo, post nelonge

la lupo denove kuratingis lin. Al li restis nur la lasta peco da viando. Kion fari? Li pensis: "La lupo estas neniam satigebla. Se mi ne mortigos ĝin, ĝi certe formanĝos min." Estis feliĉe, ke apud la vojo staras arbego. Li rapide surgrimpis la arbegon kaj pendigis la hokon sur branĉo. La viando svingiĝis tien kaj reen en aero.

La lupo venis sub la arbegon kaj vidis la viandon svingiĝanta en aero. Ĝi larĝe malfermis la buŝon kaj forte eksaltis supren por kapti ĝin. Sed, ankaŭ ĝi estis hokita kiel fiŝo kaj pendis sur la branĉo.



Tarifo: 1 internacia respondkuponno por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperiĝi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 17-jara Ngangu-Md. Moliere, 27, Rue de Madimba no. 27, Kim, N'Djili Q6, Zairio, deziras korespondi tutmonde.
- * Mezaĝulino deziras korespondant(in)ojn ĉinajn antaŭ Kongreso: Jean Smythe, 48 Columbia Place, Calgary, Alberta, T2L0R5, Kanado.
- * S-ro Ryszard Swiergocki, Slowackiego 64/6, Jelenia Gora, Pollando, dez. kor.
- * 18-jara junulo (sportisto), deziras korespondi kun geesperantistoj tutmonde, Muhamed Karahodzic, Rakovcani 5, 79000 Prijedor, Jugoslavio.



- * 15-jara hungara knabino Gabriella Mester, Nyiregyhaza, Piacs ut 107, 4405 Hungario, vol. kor. kun ĉinaj esperantistoj.
- * 20-jara studento Mehran Khakpour, 236-Ferdowsi ST 11, Shahin Shahr-Esfahan, Iran, vol. kor. pri ĉiuj temoj, precipe pri medicino.

PROponoj kaj KRITIKoj

Ĝenerale dirite via revuo tre tre plaĉas al mi. Tamen laŭ mi, vi raportas tro multe pri ekonomio, scienco kaj tekniko. Nur malgrandigu la parton pri tiuj temoj kaj jam estus bone.

La seriojn "Niaj Perantoj", "Por Via Sano" mi tute ne legas, ĉar ili ne interesas min, sed eble aliajn legantojn.

La rakontoj por komencantoj estas belaj kaj ĉarmaj, sed bonvolu ne fini ilin per politika frazo kiel en la rakonto de la numero 4, 1984, ĉar tio ne estas taŭga kaj por ne-ĉin(in)o ne komprenebla. Krome apud tiu ĉi rakonto oni vidas bildon kiu jam preskaŭ malkovras la sekreton de la fino, tiamaniere la rakonto ne plu estas tiel interesa.

En la artikoloj pri la ĉinaj atingajoj certe estus bone, se vi ne nur dirus ĉion bonan pri via lando,

sed ankaŭ montrus la flankojn ne bonajn aŭ malagrablajn.

Florina Caragea
(FR Germanio)

Mi ne povas imagi kiel pli-bonigi la temojn aŭ la enhavon en la elstara gazeto. Eble kelkaj artikoloj povos inkluzivi pli da detaloj, kiam la artikolo traktas pri politiko aŭ politika filozofio; ekzemple, kio estas la filozofia celo? Kio estas la pli grava, por la popola feliĉo? Kiel gravaj estas la trajtoj de bonkonduco, respekto, amo, aktuala kulturo en la vivo de la popolo, kaj kiel vi instruas pri ĉi tiuj al infanoj kaj plenaĝaj?

Gordon Elliott
(Anglio)

Vi devas plibonigi la elekton de literaturaĵoj. Neniu el tiuj publikigitaj noveloj estas bona. Aperigu (bonajn) poemojn! Tre bonvena

estas la publikigo de fabloj kaj legendoj, kiel tiuj de numero 12.

Carlos A. Castrillon
(Kolombio)

Ĝenerale tre bona revuo, kiun mi ne dezirus perdi. Sed ekzistas unu afero, kiu ne plaĉas al mi. Temas pri "El la 'Kanto pri la Ĉina Revolucio'" en 12 numero 1984. Mi ĉiam trovis la ĉinan baletan kiel grandioza arto.

Barbara Kucharska
(Pollando)

Mi havas du proponojn: (1) Bonvolu publikigi originalajn aŭ tradukitajn poemojn. (2) Ni eŭropanoj ne konas ĉinajn kulturajn, sciencajn eminentulojn. Mi deziras legi pri ilia vivo, aktivado, kreaĵo kaj verko.

Gábor Márton
(Rumanio)

- * 29-jara prof. lingvistiko deziras korespondi kaj interŝ. poŝtmarkojn kun bhutanaj, ĉinaj, andoraj, nepalaj, marokaj, sri-lankaj, hindaj, sikimaj, pakistanaj kaj afganaj.
- * 14-j. Gall Denes, str. Ciumani 1073, Jud. Harghita, loc. Joseni 4206, Rumanio, deziras korespondi kun hungaro pri diversaj temoj.
- * 13-j. Pall Erzsebet, str. Bakta 171 Jus. Harghita, loc. Joseni 4206, Rumanio, deziras korespondi kun hungaro kaj germano pri diversaj temoj.
- * Aŭstralia pupisto (Lloyd Noble, 14 Acton Avenue, Windsor Gardens, South Australia, 5087) korespondus kun ĉinoj kaj tut-

mondo pri pupteatro, ankaŭ muziko, literaturo kaj kutimoj de popoloj.

- * Molnar Eniko, str. Zorilor 2, 4214 Ditrau, Jud. Harghita, Rumanio, deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.
- * Deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj. Adreso: Kedves Adolf (16-jara), str. Rezalja 135, Loc Sindomic, Jud. Harghita 4142, Rumanio.
- * 16-jara Sandor Margit, Akadan 1206, Ciumani 4207, Harghita, Rumanio, volas korespondi kun hungaro pri diversaj temoj.
- * S-ino Henryka Kus, Trautmana 4, 42-650 Piekary SL6, Brzeziny

SL, Pollando, deziras korespondi kun la tuta mondo.

- * Esyta kaj Tomek Tomczak, Stowacka 23/4, PL 65-617 Ziel Gora, Pollando, volas ekligi korespondadon kun samaĝuloj 9-12-jaraj por ŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.
- * Mi deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Lindolfo Campos, poŝtkesto 253, Campina Grande-58100, Brazilo.
- * Junulara Esperanto-Societo "Juneco" el Bulgario, dez. kontaktiĝi kun gejunuloj el diverslandoj. Bonv. skribi al S-ino Maria Petkova Slaveva, 9700 Ŝumen, Jskra 22, Bulgario.

(Daŭrigo sur p. 68)

第十三课 Dektria Leciono

(Por relernado)

问 候 Wèn hòu (Saluto)

Nín hǎo!

您 好!

Saluton!

Huānyíng!

欢 迎!

Bonvenon!

Xièxie.

谢 谢。

Dankon.

Wǒ dìjīcì lái Zhōngguó.

我 第一 次 来 中国。

Mi venis al Ĉinio unuafoje.

Dào Zhōngguó lái wǒ hěn gāoxìng.

到 中国 来 我 很 高兴。

Mi tre ĝojas veni al Ĉinio.

Nín shēntǐ hǎo ma?

您 身体 好 吗?

Kiel vi fartas?

Hěn hǎo.

很 好。

Tre bone.

Zài jiàn!

再 见!

Ĝis revido!

Sube estas kelkaj klarigoj pri prononco kaj skribo de la Han-lingva Fonetika Alfabeto:

1. Se i kaj u funkcias kiel memstaraj silaboj, ili devas esti skribitaj kiel yi kaj wu. Kaj se ü estu memstara silabo, ĝi devas esti skribita sen supersigno kaj antaŭ ĝi devas esti aldonita y (ü — yu).

2. Se i estas komenclitro de silabo, ĝi devas esti skribita kiel y. Tio koncernas jenajn diftongojn: ia-ya, ie-ye, iao-yao, iou-you, ian-yan, iang-yang, in-yin kaj ing-ving.

3. Ne prononcu la vokalon i kiel [i], kiam ĝi staras post z,c,s, zh, ch, sh, kaj r. En tiaj okazoj ĝi funkcias, nur kiel signo por formi apartajn silabojn. La sonvaloro de i post z, c kaj s estas [ɿ], kaj post zh, ch, sh kaj r, estas [ɿ].

4. Se j, q kaj x staras antaŭ ü, ü devas estis skribita sen supersigno. Ekzemple: xunzhao (serĉi).

5. Se uei kaj uen staras post konsonanto, ili devas estis kribitaj simple kiel ui kaj un. Ekzemple: zui (buŝo), cun (vilaĝo).

6. Se u estas ĉe la komenco de silabo, ĝi devas esti skribita kiel w. Ekzemple: ua-wa.

7. Se üe funkcias kiel memstara silabo, ĝi devas esti skribita kiel yue. Simile, üan-yuan kaj ün-yun.

8. er povas esti memstara silabo. Ekzemple: erzi (filo). Kiam ĝi staras laste, post alia(j) silabo(j), pro prononca nuanco de iuj ĉinaj dialektoj, ĝi funkcias kiel finaĵo kaj skribiĝas sen vokalo e. Ekzemple: nar (tie).

9. Por bone distingi la antaŭan silabon de la malantaŭa, kies komenclitro estas a, o aŭ e, oni devas uzi apostrofon "'". Ekzemple: Tian'anmen (Ĉielpaca Pordego).

10. En han-lingvo estas iuj silaboj, kiuj legiĝas mallaŭte kaj mallonge kaj skribiĝas sen signo de tono. Ekzemple: nǐmen (vi) kaj xièxie (danko). "mem" kaj "xie" estas tiaj silaboj.

(Daŭrigo de p. 66)

- * 25-j. Joanna Renn, ul. Buska 6/14, 53-326 Wroclaw, Pollando, interesigas pri parapsikologio, turismo, muziko kaj kolekti bildkartojn.
- * 28-jara fraŭlo Jerzy Jankowski, 58-260 Bielawa, ul. Bieruta 4/9, Pollando, deziras amikecon tutmonde.
- * 60-jara Siraŝi Ken, Neoporisu 360 Ŝimotomi 1157-34, Tokorozawa-ŝi, 359 Japanio, deziras korespondi kun ĉinaj samideanoj.
- * Mi deziras korespondi kun homoj el Azio, Afriko kaj Sudameriko pri muziko, literaturo, politiko ktp. Thomas Kolb (17-jara), Bismarckstr. 78, D-7080 Aalen, FR Germanio.
- * S-ino Dorothy Lee, POBox 288, Redlands, California 92373, USA, deziras korespondi kun geĉinoj pri ĉiutaga vivo, hobiaj, vojaĝado.
- * 27-jara Elzbieta Borecka, 44-100 Gliwice, Ul.Czajki 2/16, Pollando, dez. kor. kun ĉinoj kaj japanoj pri ĉ. t., precipe la hodiaŭa vivo de homoj.
- * Kozma Attila, Gari 1227, Lazarea, Harghita 4215, Rumanio, dez. kor.
- * 17-jara Laczko Erzsebet Judit, Bako 1896, 4212 Remetea, Harghita, Rumanio, dez. kor. tutmonde pri ĉiuj temoj.
- * 22-jara Marek Bammerski, 42-300 UPT Myszkow, Pollando, deziras korespondi pri ĉiuj temoj.
- * Csergo Timea, 16-jara mezlerantino, Bul.23 August. Bl.D/2 AP.26, 4200 Gheorgheni, Harghita, Rumanio.

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Mia Vizito al la Ĉina

Pavilono en

Disneyworld, Usono

Artikolo kaj fotoj de **HYMEN MELTZ**

En januaro mi vizitis la Ĉinan Pavilonon en Walt Disney World en Orlando, Florido, Usono. La registaro de Ĉinio konstruis tie unu plej belan pavilonon kiel daŭran ekspoziciejon de Ĉinio pri la lando, popolo kaj historio.

Kiam mi aŭdis, ke en januaro estos speciala festego en la Ĉina Pavilono, mi decidis iri rigardi ĝin. Mi ne estis malkontentigita. Mi kaj mia edzino havis mirindan viziton kaj faris multajn fotojn, kiujn vi vidas ĉi tie.

La plej spektakla daŭra ekspozicio estas unu 360-gradaj filmo montrita en granda, ronda ĉambro. Ni eniris en la ĉambro kun multaj aliaj homoj kaj staris en la centro de la ĉambro. La ĉambro mallumiĝis kaj oni projekciis ĉinan filmon sur la muroj tute ĉirkaŭ ni. Ni vidis la montojn, la Grandan Muron, la interesajn homojn, kaj multe, multe pli. En malmultaj minutoj ni vidis la tutan Ĉinion.

Ankaŭ estis ekspoziciejo de antikvaj artaĵoj. Estis ĉinaj metiistoj, kiuj laboris kun artaĵoj. Oni povas aĉeti tie memoraĵojn.

Ĉar estis speciala festego, ni estis feliĉaj vidi la folklorajn dancistojn kaj akrobatojn de Hebej-provinco, Ĉinio.

Ni vidis ankaŭ multajn objektojn en la pavilonoj de Meksikio, Kanado, Japanio ktp. Sed la Ĉina Pavilono estis la plej bona. Tie malgranda delikata ekvido vekis ĉe mi deziron viziti la realan Ĉinion.



81500

